

Antologio XIII

Hector Hodler

Direktoro de Universala Esperanto-Asocio

Milito kaj paco, Novaj vojoj (1915-17)

Artikolaro publikigita en la gazeto *Esperanto*, UEA, 1915-17

Enkonduko:

En e-istaj medioj, Hector Hodler (1887-1920) estas konata figuro precipe lige kun la unuaj jaroj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Ĝenevo, kiel redaktoro-eldonanto de ĝia revuo *Esperanto*, malpli kiel filo de la renoma svisa pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918) kaj ankoraŭ malpli kiel verkisto de studoj pri la pacproblemo. Liaj vivojaroj kongruis kun la tempo de la Balkanaj Militoj (1912-13) kaj precipe de la Unua Mondmilito (1914-18). Hector Hodler multe okupiĝis pri la kaŭzoj de la militoj kaj pripensis, el la vidpunkto de la internacia juro, kiaj kondiĉoj estus necesaj por atingi verajn internaciajn pacon kaj justecon. Ĝuste en la menciita revuo *Esperanto* (UEA) li aperigis, sub la titolo *La pacproblemo: novaj vojoj*, siajn modelajn artikolojn ĉi-tamajn, kaj per tio li prezentis sin al la publiko kiel engaĝita homo, kiu profunde okupiĝis pri la pac-problemoj de sia epoko. Analizante la temon el vidpunkto de la humanismo kaj internacia juro, Hodler pruvis, ke li estas sperta fakulo sur tiu tereno, kaj ke la lingvo kaj movado Esperanto estas intime ligitaj kun la pacproblemo. Ĉi-rilate, unu el liaj frazoj, kiuj klare montris la ligon inter Eo kaj la pacproblemo, estas memorinda: „Eo certe plifaciligos la interpopolajn rilatojn kaj ebligos iom post iom la formiĝon de supernacia kulturo. Sed krom tio ke tiu grandega tasko estos tre longedaŭra, ĝi estas realigebla nur se la politikaj internaciaj kondiĉoj ne malhelpas ĝin starigante ĉiuspecajn barojn inter la popoloj kaj eternigante la plej krudajn antaŭjuĝojn.”

La reproduktado de liaj gazet-artikoloj en ĉi tiu Antologio ampleksas la tekston ‘Milito kaj homa energio’, kiu aperis en *Esperanto* 178 de la 5a de junio 1915. Post tio sekvas la unuaj ses artikoloj el la serio aperinta sub la titolo ‘La pacproblemo – Novaj vojoj’, kiu konsistas el entute 18 partoj kaj kiu etendiĝis de la 5a de julio 1915 ĝis la 5a de februaro 1917.

La unuopaj artikoloj tuŝas la sekvantajn temojn: Solvo de la militproblemo, milito kiel rezulto de la malamo inter la popoloj (I), kondiĉoj por la starigo de nova internacia pacordo (II), pacifistaj proponoj, juraj principoj kaj arbitracio (III), malfacilaĵoj de la apliko de la arbitracio en la praktiko laŭ konkretaj ekzemploj, sankcio, kolonioj (IV), programo por la starigo de instituciaj strukturoj pacordaj, aneksitaj nacioj (V), popolrajtoj, teritoriaj demandoj, unuigentaj kaj plurgentaj regnoj, hazardaj landlimoj ktp. (VI).

En la sekvaj artikoloj Hodler skizis siajn imagojn kiel internacia pac-organizaĵo (ŝtatligo) povus funkcii. Inter alie li ankaŭ analizis la rolon de la gazetaro. En sia fina konkluda artikolo de la 5a de februaro 1917 Hodler pledis, por ke preta elito ne nur parolu pri la grandioza tasko de la starigo de la monda federacio, sed konkrete realigu ĝin. La pacifista edukado ne sole restu teoria, sed fariĝu praktika, kaj ankaŭ la nura raportado en la ĉiutaga ĵurnalaro ne sufiĉas. Urĝe necesus plioftigi la korespondadon kaj la personajn rilatojn inter diverslandanoj, ekzemple per la aranĝado de studvojaĝoj al aliaj landoj. Sed sen la ĉesigo de la pasioj inter la nacioj, sen la ekzisto de toleremo inter la popoloj kaj sen la formiĝo de nova pensmaniero la situacio ne pliboniĝus.

Per sia artikolaro Hodler deziris atentigi pri la diversaj aspektoj de la pacproblemo kaj alvoki la akcelon de la starigo de pli bona ordo internacia, kiu malebligis la militojn kaj malfortigus aŭ eĉ likvidus la interpolan malamon.

Kritikante la ĥaosan staton, kiu regis en tiu tempo, kaj la embrian staton de la internacia juro, Hodler estis konvinkita, ke militoj, havante kapitalistan devenon, malaperos, nur kiam estos transformita la socia ordo, kiu ilin naskis kaj kiam la suverenaj ŝtatoj estas subordinataj al iu supera komuna regularo internacia, kiu antaŭvidas jurajn principojn, la rimedojn de la arbitracio kaj la sankciojn por solvi la nepolitikajn internaciajn malkonsentojn.

Hodler kredis, ke la venka milito tute ne plialtigus la ekonomian bonstaton de la popolamaso mem, sed nur de difinitaj klasoj kaj ke la ideo, kaj ke ŝtato, obeanta al malĝusta ĝenerala doktrino, almilite nur por la ekonomia gajno. Sekve la nacioj kune estus pli fortaj kaj pli prosperaj en la kazo de internacia ordo ol se regas anarkia situacio. La forigo de la almitoj kaj la respekto al la popolrajto je memekzisto postulus asocion de la nacioj, t.e. interŝtatan organizon. En januaro 1920 la Ligo de Nacioj fakte komencis sian laboradon. Kaj fine de marto de la sama jaro Hodler mortis.

Per la postulo, ke la principoj de la popolrajtoj devas esti fiksitaj per la internacia juro kaj ke ĉiu popolo devas ricevi la liberan elekton de sia sorto, Hodler – eble neatendite por multaj e-istoj – mem fariĝis teoriisto, pioniro aŭ advokato de la moderna internacia juro. Oni miregas pri la faka kono, stilo, logiko, lingvaĵo kaj kuraĝo de la aŭtoro renkonteblaj en tiuj trafaj artikoloj, kiuj en multaj rilatoj ne perdis sian aktualecon, ĉar eĉ en la 21a jarcento la homaro daŭre almilite, fakte pro la samaj kaŭzoj kiel cent jarojn antaŭe.

La artikoloj multe malkaŝas pri la personeco, pensmaniero kaj karaktero de Hector Hodler mem. Pro tio liaj tekstoj apartenas, apud tiuj de lia kolego Edmond Privat (1889-1962), al la klasikaĵoj de la Esperanto-literaturo. Tralegante ilin, oni sentas fortan estetikan ĝuon.

Originala teksto (en Esperanto):

Milito kaj homa energio

Esperanto (UEA) N-ro 178 / 1915

Kio karakterizas ĉiun militon estas la grandega elspezo de energio, kiun ĝi kaŭzas: mirinda streĉado de ĉiuj homaj fortoj direktitaj al unu celo, kunplektiĝo de ĉiuj individuaj deziroj celantaj al unu fino. Sendube, en normala tempo, la homaro elspezas grandegan kvanton de energio, sed ni ne konscias pri ĝi tiel klare, ĉar la celoj de la homa agado aperas ekstreme diversaj. Plie, pro la alkiutimiĝo, homo ŝajne bezonas malpli da energio por plenumi sian ĉiutagan laboron, ol por elteni la eksterordinaran streĉadon, kiun alportas la milito. La ĉefĝeneralo, kiu havas sub sia respondeco la kondukadon de la militoperacioj, la subuloj, kiuj

respondas pri la efektivigo de tiuj operacioj, ĝis la simplaj soldatoj, kiuj tagojn kaj noktojn mizere staras en la tranŝeoj, estas submetataj je altgrada streĉado; la unuaj por kunteni ĉiujn fadenojn de la giganta maŝino kaj precize decidi je la taŭga momento, la lastaj por rezisti al la senkuraĝiĝo superregi la timon kaj la abomenon, akcepti la malkomforton, kaj fariĝi malgrandega, pli ol humila, parteto de vastega organismo ilin ĉiujn enkorpiganta.

Sed ne sole ĉe la batalantoj mem aperas tiu nin miriganta energio. Por kontraŭbatali la premantan angoron, por reteni larmojn ĉe la foriro de la amato, por superi la ĉagrenon, kiam ilin trafas la malfeliĉo, la virinoj ankaŭ elmontras admirindan energion. Oni eble bezonas pli da vera animforto por senespere atendadi novaĵojn de la malaperinta amato kaj dume daŭrigi la ĉiutagan vivon, ol por stari meze de la bataldanĝeroj: la militisto staras sub la potenca influo de la medio, li jam enpense fordonis sian vivon al la sorto, kaj plie estas en tia medio, ke lia racio ne plu povas funkcii kiel antaŭe, sed la virino, senigata je la edzo aŭ je la filo, vivas ĉiam en tiu sama rondo, kiu vidis lin; en la soleco de la hejmo ŝia racio povas libere trapenetri kaj analizi la malfeliĉon. Tial, tre ĝuste militistoj ofte skribas al siaj amatoj por ilin instigi al trankvileco kaj pacienco, kaj, pro profundaj sentoj, ili priskribas sian situacion en pli brilaj koloroj ol ĝi reale estas.

Fine, la milito mem streĉas la energion de multaj homoj, kiuj, kvankam ili ne rekte partoprenas en la batalado, estas necesegaj al ĝia disvolvo: la teknikistoj, kiuj devas multege pliigi sian penadon, la kuracistoj kaj flegistoj, la viroj kaj virinoj okupataj en tiuj multnombraj helpentrepretoj, kiujn naskis la milito.

Ke tiu spektaklo prezentas en si mem ian belecon - kiel ĉia manifestiĝo de homa energio - neniuj neas. Ĝi aperas tia, precipe kiam oni forigas la alian flankon de la medalo, t. e. la vizioj de buĉado, mortigo kaj rabadoj, kiuj estas la nepraj akompanantoj de ĉiu milito. Ĝuste tiun kunstreĉigon de energio tre admiras la militdefendantoj, kaj sur tio ili sin apogas por deklari, ke la milito estas nobla kaj utila. „La nobleco de la milito, skribas unu el la plej famaj el tiuj militdefendantoj, kuŝas en tiu fakto, ke la homo en sia malgrandeco tute malaperas antaŭ la granda ideo de l' ŝtato...; la popoloj kaj la ŝtatoj ne povas plenumi ion pli grandan kaj pli superbela ol meti ĉiujn siajn energiojn je la servo de la libereco, sendependeco kaj honoro. Nur tie, kie la milito estas ebla, la risortoj de la karaktero povas esti obstine streĉataj, necesa kondiĉo por realigi la plej noblajn taskojn de la civilizacio, en la plena disvolvo de la moralaj kaj intelektaj fakultoj.” La aŭtoro de tiu penso, esprimita de multegaj aliaj, do opinias, ke sen la milito aŭ almenaŭ la militrisko malaperus la fortostreĉado, necesa faktoro de nia civilizacio.

Ni aldonas, ke eĉ multaj malamikoj de la milito ne povas sin deteni de admiro ĝuste pro la spektaklo de superenergio, kiun prezentas la milito. Antaŭ kelka tempo, ano de unu el la militantaj landoj diris al mi: „Se vi vidus, kiel ĉio nun estas superbela en nia lando! Kia laborado, kia ordo, kia oferemo! Malgraŭ ke mi ne estas militdefendanto, mi ne povas min deteni de admiro.” El tiu konstato mia alparolanto kompreneble konkludis, ke pro ĉiuj tiuj virtoj lia lando meritas la venkon. Nu, tute similajn rimarkojn mi kelkan tempon antaŭe aŭdis pri lando malamika al la unua. Ambaŭ alparolintoj estis pravaj, sed ambaŭ *ne volis* pensi, ke ĉe la malamiko regas la sama spirito, kaj kiam mi insistis pri tio, ili videble suferis. Ili tre admiris la efikojn de la militenergio, sed kredi, ke la sama kaŭzo povas en la najbara lando produkti la samajn efikojn, estis al ili netolereble.

Tian spiritstaton plej ofte kaŭzas manko de kritikemo kaj objektiveco. Certe la streĉado de la energio estas io dezirinda kaj bonfara, necesega je la progreso de la civilizacio. Sed ne ĉia streĉado estas utila al la

homa socio. Necese estas vidi, al kio estas uzata la elspezata energio. Nu, ĉe la milito, la rekta rezultato de tiu streĉado estas antaŭ ĉio la *detruado* de aliaj energioj.

Certe, la militidealistoj asertas, ke milito celas la defendon de supera idealo - kiun ili plej ofte tute ne difinas - kaj ke la detruado estas nur rimedo por atingi tiun celon. La energio estas elspezata por la defendo de ideoj (libereco, sendependeco, honoro, kulturo, vivrajto ktp.). Niaj idealistoj forgesas nur unu punkton, nome, ke la malamiko ankaŭ kredas batali por samaj ideoj. Legante la skribaĵojn en la diversaj militantaj landoj, la observanto estas surprizata renkonti en ili la samajn idealceladojn kaj la samajn pravigajn esprimojn. Se oni flankelasas la frazeologion, per kiu la militemuloj penas kovri la militteruraĵojn, oni konstatas ke la celo - aŭ, se oni preferas, la rezultato - de tiu grandioza manifestiĝo de energio estas la detruado. Kaj kion oni detruas? Homojn, kiuj elmontras saman energion kaj saman idealismon. Jen estas konstato sufiĉa por moderigi nian admiron, ĉar ni sentas, ke la rezultato de tiu energio estas absurda. Sed tiun senton pri la vaneco de la militagoj ankoraŭ kovras dikega tavolo de mistikaj konceptoj, fortaj antaŭjuĝoj kaj belsonaj frazoj mistere efikantaj je niaj animoj.

Elspezi energion ne ĉiam signifas progresi. Niaj prapatroj faris amason de militoj, kies kaŭzoj ŝajnas al ni ofte sensignifaj - same kiel aperos al niaj prafiloj la kaŭzoj de niaj nunaj militoj; ili ankaŭ elspezis energion kaj streĉis sian penadon. Ni nun scias, ke tiuj militoj tute ne progresigis la civilizacion. Se militoj havus tian efikon, plej altan civilizŝtupon havus la Mezepoko, kaj la sovaĝuloj, kiuj konstante militis, estus la plej noblaj reprezentantoj de la homa gento. Ni tamen scias, ke ĝuste la manko de sekureco, kiun kaŭzas la milito kaj la militdanĝero, nebligas la starigon de la civilizacio. Tiu ĉi disvolviĝis nur kiam la militoj fariĝis malpli oftaj kaj la ŝtatoj estis pli firme starigitaj, tiel ke ordo povu ekzisti.

Fakte, la militidealistoj plej fervoraj eĉ allasas, ke la paco estas la normala stato, sed ke de tempo al tempo militoj estas necesaj por eksciti la homan energion kaj malhelpi, ke nia civilizacio moliĝu.

Ĉu la faktoj konfirmas tiun pesimismon?

En la lasta tempo la militoj estis pli maloftaj; oni nun facile povas konkludi, ĉu malgraŭ tio la kuraĝo de la homoj moliĝis. Oni eble asertos, ke la deviga militservo kaj la risko de la milito sufiĉas por ke la militistaj ecoj konserviĝu. Sed kiel klarigi, ke saman kuraĝon montras laŭbezone viroj apartenantaj al landoj, kiuj ne havas la devigan militservon, aŭ kiuj de longe estis forgesintaj ĝiajn instruojn, kiam oni alvokis ilin? En la realeco, oni konfuzas du malsamajn vidpunktojn: la fizika kaj la morala.

La milito certe plifortikigas la homan korpon, sed ĝi ankaŭ povas tute ĝin detrui. La bonajn efikojn de la milito je la vidpunkto de la homa sano oni povas atingi en multe pli malkara maniero per racia eduko de la junularo kaj per modera praktikado de la sporto. Rilate al la morala vidpunkto (pacienco, rezistemo, sinferemo), la milito *trudas* al la viro certajn virtojn, sed oni preskaŭ ĉiam forgesas, ke je la socia vidpunkto la rezultato estas malgranda: Tiuj moralaj ecoj montriĝas en tute speciala medio kaj en cirkonstancoj eksterordinare esceptaj; ili ne estas naturaj, sed artefaritaj. Tial, ili ne estas daŭraj. Reveninte al sia antaŭa medio kaj repreninte la ĉiutagan vivadon, eĉ la plej granda heroo daŭrigos vivi kiel antaŭe. Oni kun miro citas elegantulojn, kiuj dum la paco pasigis unu aŭ du horojn antaŭ la spegulo por sin zorgege vesti kaj admiri, kaj nuntempe vivas kontente en la malpuraĵoj de la tranŝeoj kaj tute forgesis sian luksemon. Tio

pruvas, ke la homo facile adaptiĝas al la cirkonstancoj. Sed tre verŝajne okazos, ke post la milito, kiam li reiros en la civilizacian staton kaj vivos en la sama rondo kiel antaŭ la milito, la antaŭa heroo refariĝos elegantulo kaj daŭrigos dediĉi grandan parton de la tempo al la zorgoj pri sia ekstera persono.

Por ke la milito ŝanĝu la ecojn de la homoj, estus necese, aŭ ke ĝi daŭru ĉiam (kion neniu proponas) aŭ ke ĝi egale influu al ĉiuj. Sed la maksimumo de la militistoj rilate al unu lando estas la dekonono de la enloĝantaro. La restantaj naŭ dekononoj ne multe ŝanĝas sian vivadon (ĝuste pri tio fieriĝas la militantaj landoj). Kiam la restintoj el la foririnta dekonono revenos, ne ili trudos al la ceteraj sian vivmanieron, sed ili alferiĝos al la vivmaniero de la ilin ĉirkaŭanta medio, eĉ kun granda plezuro. Regos do la samaj mankoj, pri kiuj ni antaŭe plendis, la samaj apetitoj kaj la samaj vivceladoj. Se oni tiam komparos la moralan staton de la militintaj landoj kun tiu de la nemilitintaj, oni verŝajne ne konstatos gravan diferencon rilate al la grado de energiemo kaj moraleco de iliaj enloĝantoj.

Cetere, la homoj, kiuj senĉese ĝemas pri la dekadenco de nia socio kaj la utileco konservi la militon kiel revertigilon, estas aŭ nekuraceblaj pesimistoj aŭ personoj tre supraĵaj. Ili juĝas landon aŭ socion laŭ kelkaj ekstremaj kaj strangaĵoj, kiuj floras precipe en la urbegoj kaj ĉiam ekzistis, malgraŭ sennombraj militoj. Ili atentigas nur tion kaj tute forgesas la grandegan plimulton de la homoj, kiuj multe penas laborgajni sian vivon, sane kaj honeste vivas. Eĉ pri ŝajnaj dekadenculoj oni povas erari. Unu el tiuj pesimistoj iam diris al mi rigardante junulon, kiu en 'plezurloko' ŝajnis sin fordoni al la moleco. „Vidu tiun tipon de dekadenculo”. Nu, tiu sama junulo estis tre kuraĝa aviadisto el la unua epoko, kiu riskis sian vivon tie, kie mia alparolanto certe ne riskus sian.

Kio moligas la homon kaj kondukas al dekadenco ne estas la paco, sed la *manko de idealo*. Por ke la homa energio, fundamenta elemento de kreado kaj progreso, ne malfortiĝu, necese estas, ke la homo havu ian idealon lin superantan, ke lia vivo aperu al li, ne kiel celo, sed kiel rimedo por atingi ian celon fiksitajn de lia spirito. Tiu, kiu obstine celas al *io pli bona*, neniam estos dekadenculo, tute egale ĉu li estas klerulo aŭ simpla laboristo. Nur kiam la homaro ĉesos rigardi antaŭen, la profetoj de la pesimismo povos ektimi. Sed la milito ne plu povas esti la idealo de sana homaro. Eĉ la plej viglaj militdefendantoj allasas, ke la milito estas evitinda; ĝi do estas malbonaĵo.

Estas supozo sur nenio sin apoganta, ke paca stato malpliigus la homan streĉadon. Kontraŭe, la homa laboremo, agemo kaj iniciatkapablo povas tiom pli libere ekzerciĝi kiom pli granda estas la sekureco. De kiam niaj ŝtatoj fariĝis sufiĉe bone organizitaj por regigi ordon sur sia teritorio, ne sole la energio antaŭe dediĉita al reciproka ekstermado, ne estis neniigita, sed ĝi estis pliigita kaj almetita je civilizigaj entreprenoj havantaj pozitivan karakteron. Ameriko ne estus akirinta la gradon de civilizeco, kiun ĝi nun havas, se anstataŭ ol labori, ĝiaj loĝantoj estus pasigintaj unu aŭ du jarcentojn per senĉesaj internaj militoj. Neniu kuraĝus pretendi, ke en tiu lasta okazo la loĝantoj estus pli energiaj kaj pli moralaj ol nun kaj ke la homaro estus gajninta je tio.

Kiam inter la nunaj civilizitaj ŝtatoj estos kreita jura ligilo reprezentata per organizo kaj certiganta la pacon, la sekureco etendiĝos sur preskaŭ la tuta tergloba, kaj tiam la homa entreprenemo havos vastan kampon de agado. Jam en normala tempo, la homa energio disvolviĝas tute sen konscia rilato kun la 'granda ideo de l' ŝtato'. Miloj kaj miloj da homoj dediĉas sian energion, *ne* por pliigi la potencon de la ŝtato, pri kiu ili eĉ ne pensas, sed por agi konforme al certa idealo ellaborita aŭ alprenita de ilia spirito. La ŝtato estas

rimedo por ebligi la homan kunlaboradon, certigante la sekurecon kaj la justecon. Konsideri ĝin kiel *celon* en si mem, malatentante la fakton, ke la mondo ne konsistas *nur* el unu ŝtato, nepre kondukas al la sistemo, kies fruktojn ni nun ĝuas. Ni ne sukcesas kompreni, kial okazus, ke la risortoj de la homa energio rompiĝus, se anstataŭ sin reciproke disŝiri, la ŝtatoj interkonsentus kaj ĉesus la internacia anarkio. La ordo ne detruas la streĉadon, sed ĝi donas al ĝi pli altajn celojn. La anarkio - ni vivas nun en interŝtata anarkio - streĉas la energiojn laŭ alta grado, sed por dissemi la detruon kaj la suferon.

Ekster la milito kaj ekster la mistika idealo de la grandeco de la ŝtato, ekzistas aliaj idealoj pli konformaj al la noblaj aspiroj de la homo. Disvastigi la civilizecon super la tuta terglobo, valorigi la grandegajn riĉaĵojn de nia planedo, kontraŭbatali la mizeron, ataki la krudajn naturfortojn kaj regi ilin, estas idealoj senteble pli altaj ol ekstermadi najbarojn pro kaŭzoj ofte tre malprecizaj aŭ pro malĝusta kompreno de la interesoj de l' ŝtato. Tiuj idealoj povas esti potencaj motoroj de agado kaj energio, se nur la publika opinio favoras ilin.

Vi admiras la militenergion? Jes, ni ankaŭ, sed nian admirsenton treege superas la vera sufero, kiu nin premas, kiam ni konstatas, ke tiaj trezoroj de energio estas malŝparegataj kontraŭ la interesoj de la homaro, kontraŭ la homo mem.

La pacproblemo - Novaj vojoj

I *Esperanto* (UEA) N-ro 179 / 1915

Kiam ie regas epidemio, oni penas ĝin kontraŭbatali per du manieroj: unuflanke, kuracistoj kaj flegistoj laboras por savi kiel eble plej multajn homojn je la premo de la malsano, eviti disvastiĝon de la malfeliĉego, kaj limigi ĝiajn ruinigajn efikojn. Aliflanke, higienistoj kaj ŝtelistoj, per funda esploro, elserĉas la kaŭzojn de la epidemio, kaj per ilia forigo celas neebligi la revenon de la danĝero. Ambaŭ laboroj estas same utilaj al la komunumo. Tamen, praktike, dum la unua agado interesas je plej alta grado la tutan loĝantaron, la dua - ĉar ĝi rilatas al la estonto - vekas atenton kaj kunlaboremon nur ĉe tiu malgranda homgrupo, kiu kuraĝas rigardi trans la nunaĵoj.

Ĉe tia katastrofo kiel la milito, sin elmontras ambaŭ kuracmetodoj. Unuparte, agas la empiria kuracado, kiu nur celas ĉirkaŭbari la malfeliĉon kaj laŭeble malpliakrigi la suferojn, kiujn ĝi dissemas, Tiun taskon prizorgas la multnombraj helpinstitucioj, kiujn naskis la militpostuloj, kaj densaj aroj de sindonemaj viroj kaj virinoj. Ĝin ankaŭ plenumas la diverslandaj bonintenculoj, kiuj penas rezisti al la ondegoj de ŝovinismo minacantaj superdronigi la hontan saĝon.

Aliparte, la kuracadon per serĉado kaj forigo de la veraj militkaŭzoj provas kelkaj organizaĵoj, ankoraŭ tre malfortaj; tra multaj malhelpoj, ili serĉas novajn vojojn, penas rompi la fatalan ideorondon, interne de kiu moviĝas la homaro. Sed dum la unua celado - milithelpado - vekas ĉies simpatian kaj

kunlaboron, la dua celado - batalo kontraŭ militsistemo - estis konsiderata aŭ kiel utopia okupo apenaŭ atentinda aŭ kiel danĝera agado nepre ĉesigota.

Miri pri tio oni ne devas. Por la tre granda plimulto de la homoj, la demando estas efektive ekstreme simpla. Kulpa estas nur la malamiko. Ĝi volis la militon, ĝi atakis, ĝi rifuzis ĉiujn pacajn solvojn. Sekvas el tio, ke sufiĉas ĝin bategi, tiel ke ĝi ne plu kuraĝu rekomenci antaŭ kelkaj generacioj. Daŭran pacon ĉiu deziras, sed ĉiu samtempe opinias, ke tiun celon oni povas atingi nur per plena venko super la malamiko, al kiu oni aljuĝas la tutan respondecon de la katastrofo. Tiu opinio havas la profiton, ke ĝi trudas kiel eble plej malmulte da pripenso. Ĝi lasas liberan kampon al la pasioj, kaj trankvilige efikas je la spirito. Plie, el la nacia vidpunkto ĝi estas necesaĵo: oni malpli volonte oferas sian vivon, se la analizo jam ŝancelis la kredon pri la absoluta praveco de la propra lando.

Verdire tiu kredo preskaŭ neniam devenas el zorga studado de la faktoj (tute senpartia studado estas tie neebbla); ĝi estas ellaborita de la animoj sen influo de la racio. La kleruloj, kiuj per ĉiuspecaj verkoj penas pruvi, ke senkulpa estas sole ilia lando, nur helpas por poste doni al tiu spontana kredo racian fundamenton. Estas do tre malfacile trakti la militproblemon, ne nur ĉar ĝi estas jam malfacila per si mem, sed ankaŭ ĉar eĉ la plej trafaj argumentoj kaj rezonadoj senĉese rompiĝas kontraŭ la enradikigitaj kredoj pri absoluta justeco de la propra nacio. Kontraŭ tiu kredo, la racio estas tre malforta. Nur iom post iom, kun la apogo de la faktoj ĝi agas.

Tamen, ĉiulande, sed precipe tie, kie la militfaktoj ne ŝanĝis la penskondiĉojn, ekzistas malgrandaj aroj de homoj, kiuj pro konvinkoj antaŭe alprenitaj ne akceptis tiun unuflankan respondon pri la plenkulpeco de la malamiko. Ili vidas en la nuna katastrofo la rezultaton de vasta sistemo, je kies konservado ĉiu havas ian respondecon. Tiu sistemo bazas sur komune akceptitaj ideoj, kies homoj estas nur servantoj ofte nekonsciaj. Ŝanĝi tiujn ideojn estas la vera celo atingota. Por tio kunagis antaŭ la milito diverslandaj pioniroj kaj laŭcelaj organizaĵoj. Oni scias, ke ilia agado estis senefika. Ĉu post la krizo ĝi efikos pli bone? Ĉiuokaze, ne perdinte kuraĝon, kelkaj el ili denove eklaboris kaj kunrilatis por la starigo de komuna programo celanta la kreon de nova ordo internacia. Kvankam bonaj patriotoj, ili ne forgesas, ke super la nunaj patrujoj estas komuna civilizacio, frukto de multegaj penadoj. Tiun civilizacion ili volas ŝirmi kontraŭ la senĉesa militdanĝero; ĝin ili volas savi el la barbareco de la gentaj pasioj. Malgraŭ la diskreditigo, kiu momente atingas iliajn ideojn, ili esperas, ke la faktoj helpos por restarigi tiujn ideojn, kaj konduki la mondon al novaj vojoj. Flanke, atendas milionoj da homoj, ja tro pasivaj por rompi kun la miljaraj kutimoj, sed jam sufiĉe konsciaj pri tio, ke similaj travivaĵoj ne plu devas reokazi. Sed kiel?

Ne preterpasante la limojn, kiujn trudas al ni la neŭtrala karaktero de tiu ĉi gazeto, ni dezirus ekzameni la solvojn proponitajn por starigi pli bonan ordon internacian, atentigi pri la diversaj aspektoj de la problemo, kaj se eble eltiri ĝeneralan konkludon - se eble...

Antaŭ ĉio necese estas, starigi ordon inter niaj ideoj kaj balai nian spiriton ofte plenigitan je ĉiuspecaj sin reciproke kontraŭstarantaj pensoj kaj tendencoj. Por tio ni ekzameni, kiel staras la homoj pensokapablaj rilate al la problemo, kiu nin okupas.

Vastega grupo opinias, ke la militproblemo estas aŭ ne solvinda aŭ ne solvebla. Iuj juĝas, ke la milito estas en si mem bona, justa kaj nobla, ke necesa ĝi estas je la progresigo de nia civilizacio, ĉar ĝi ebligas

selekcio inter la nacioj. Laŭ la aliaj, la milito estas malbona kaj nedezirinda, sed ĝi estas malbono neforigebla. Ĉiam ĝi ekzistis; ĉio supozigas, ke ĉiam ĝi ekzistos. Sekve, oni nur penus, ke ĝi estu kiel eble plej malofta kaj malplej malhumana. Ĉiu nacio klopodu esti tiel forta, ke neniu havu la deziron ĝin ataki.

La unua vidpunkto estas ĝenerale subtenata nur de kelkaj pensuloj, ofte influaj ĝuste pro la paradokso de iliaj tezoj, kaj de profesiaj militistoj ŝatantaj sian metion kaj konsiderantaj la armeon kiel celon, ne plu kiel rimedon. La dua vidpunkto ĝis nun regis en la gvidantaj rondoj de Eŭropo. Regnestroj, ŝtatestroj, diplomatoj ĉiam publike laŭdis la pacon kaj faris el ĝia konservado la celon de sia politiko; tion ili almenaŭ diris, ke ili estis sinceraj rilate al la momento mem. Dume, la ŝtatoj kreskigis siajn armadojn, opiniante, ke tio estas la plej efika rimedo por eviti la militon. Ĝin neniu volis, sed pri ĝia forigebleco neniu kredis. Tial, oni persistis perfektigi sistemon, kies fatala konkludo estis la katastrofo. La fataleco mem de la milito sin trudis al la spirito de la popolgvidantoj, kiuj de tiam estis nur sklavoj de la sistemo. Tiam vidpunkton, ekzemple, havis la diplomatoj, el kiuj konsistis la Hagaj Konferencoj. Veninte Hagon por interkonsenti pri pli bona kunlaborado de la ŝtatoj ili trovis pli simple fari leĝojn por humanigi la militon, tiel ke ĝi estu enfermata en paragrafoj. Neniu el ili kredis je la ebleco starigi novan ordon. Akceptinte la militsistemon kaj kunveninte por fari ion, ili nur povis perfektigi tiun sistemon.

Kvankam ili malkonsentas pri la dezirindeco aŭ nedezirindeco de la milito, ambaŭ kategorioj supre aluditaj akordiĝas en tio, ke rilate al la problemo, ili staras negative: Oni nur povas ŝanĝi la limojn de la ŝtatoj sekve de la militrezultatoj, ilin grupigi tiel aŭ alie por kelka tempo, sed, poste kiel antaŭe, oni sin pretigu por eventualaj militoj kaj neniam kredu pri konstanta paco.

De longa tempo la pacamikoj direktis al la personoj tiel pensantaj diversajn pli-malpli konatajn argumentojn, kiujn ni ĉi tie ne ripetos, ĉar ni estas konvinkitaj pri ilia praktika senutileco. Evidente ne per teoriaj argumentoj povas konvertiĝi la partianoj de la nomitaj vidpunktoj, kiuj bazas ne sur la racio, sed sur la enradikigita kredo pri eterneco de la nuna sistemo. Nur gravaj faktoj, k.e. la nuna milito, kaj la influo de forta kontraŭa konvinko, ĝis nun tute mankinta, povos malsubite transformi ilian mentalecon.

La alia homgrupo opinias, ke la milito estas malbona, evitinda kaj forigebla. Ĝi ne estas natura leĝo, kontraŭ kiu la homa agado estas senpova. Ĝi estas nur konsekvenco de malbona sistemo, kiun la homoj povas forigi, se nur ili volas. Tie ĉesas la interkonsento. Pri la nova ordo internacia kaj precipe pri la maniero atingi konstantan pacon, regas tre malsamaj opinioj. Oni tamen povas ilin klasigi laŭ du vidpunktoj: unuj opinias, ke por trafi la rezultaton necesa estas unue plena reformo de la homo aŭ de la socio konforme al la postuloj de difinita doktrino. Tiun sintenadon ni povas nomi doktrina kaj absoluta. Aliaj, kontraŭe, asertas, ke nova ordo estas atingebla sen antaŭa solvo de aliaj sociaj aŭ moralaj problemoj, nur per ŝanĝo de sistemo kaj per aliĝo de kelkaj el niaj ideoj pri tutmonda politiko kaj interŝtataj rilatoj. Ni nomos tiun vidpunkton politika kaj relativa.

Kelkaj vortoj pri la partianoj de la unue citita vidpunkto estas necesaj, ĉar la ideoj de ili esprimitaj ofte tute konfuzis la problemon kaj aperigis ĝin sub utopia aspekto. Kvankam diversaj, tiuj ideoj devenas el la sama principo, nome ke ekzistas nur unu solvo absoluta: reformo de la individuo aŭ de la socio konforme al doktrino. La starigo de konstanta paco estos nur rezultato de la alprenado de tiu doktrino.

La plej disvastigata tia opinio bazas sur religia aŭ etika kredo: Ĝis nun la homoj malamamis unu la alian. La milito estis nur rezultato de tiu malamo, kiu regas inter la popoloj, same kiel ĝi regas inter la homoj. Ni do batalu kontraŭ la malamo. Ni enradikigu ĉe la individuo la ideon, ke ĉiuj homoj estas fratoj, ke sekve ili devas ami unu la alian. - Nu, kiel ajn bonaj estas la intencoj de la disvastigantoj de tiaj ideoj, oni devas konfesi, ke senefikaj ili estas je la pacproblemo. De la plej malnova tempo, ĉiuspecaj religioj kaj sektoj predikis la amon al la proksimulo. Ni ne volas aserti, ke tiuj predikoj tute ne efikis. Ĉu la homoj amas nun unu la alian pli nuntempe ol antaŭ kelkaj jarcentoj, ni ne povas decidi. Certe, ilia sentemo fariĝis pli akra; ilia scio pliriĉiĝis kaj dank' al tio ilia komprenemo plivastiĝis kaj forpuŝis la blindan malamom devenantan el la nescio. Precipe la vivado en socio kun la devoj, kiujn ĝi trudis sub la plej severaj sankcioj, enfiksis en la animojn, tra la generacioj, certajn kvalitojn, kiuj plialtigis la homon super la besto. Sed tiu akiro estas la rezultato de longega proceso. Ke ĝi ne estas ankoraŭ plene firma, pruvas la dumilitaj abomenaĵoj, ĉe kiuj, liberigite el la sociaj trudoj, la homo facile revenas al la moralstato de la unuaj agoj. Ĉiuokaze, kian ajn respondon oni faras al la supre formulita demando, restas vera la fakto, ke malmulte da influo havas je la paca problemo la demando pri amo. Interne de sama stato regas paca ordo. Neniu kuraĝus aserti, ke ĉiuj anoj de sama stato amas unu la alian. Kontraŭe, ĉar la interesoj estas pli interplektitaj, ekzistas ofte pli akraj malamoj inter samlandanoj konstante interrilatantaj, ol inter diverslandanoj malmulte bezonantaj unu la alian. La interpopola kolektiva malamo ne estas la kaŭzo de la militoj. La historio montras, ke la plej diversaj popoloj batalis jen kune, jen unu kontraŭ la alia; ili sinsekve amis kaj malamamis unu la alian, je mallongaj intertempoj. La interpopola malamo estas rezultato de la milito kaj militsistemo. Simpatioj aŭ antipatioj inter du popoloj ne havas instinktan naturan karakteron. Ili estas kreitaj de la cirkonstancoj. Sed ju pli ofte militas du samaj popoloj, des pli tiuj malamsentoj, unue malprofundaj, tendencas enfiksiĝi en la animojn, fariĝi nekonsciaj kaj heredaj. En tio kuŝas la danĝero. Se ekzistus paca ordo, la kolektivaj interpopolaj malamoj baldaŭ malfortiĝus kaj dissolviĝus; kontraŭe, kun la nuna sistemo de ripetitaj militoj, la malamo enradikiĝas pli kaj pli en la popolan animon. Por ke cedu tiu malamo, frukto de la cirkonstancoj, necesas, ke estu kreataj aliaj cirkonstancoj, kiuj ebligis ĝian eliminon. Al tiu celo tute ne sufiĉas predikoj pri homa frateco. La amo loĝas en la ankoraŭ tre malbone konata regiono de la sentoj. Ĝi ne estas krebbla per nia pripensado, sekve de pli-malpli logika rezonado. Prediki al la popolo A., ke ĝi amu la popolon B., kondukas al nenio, ĉar tiel oni tute ne atakas la fonton de la malamo, kiu kuŝas en la kontraŭeco de interesoj kaj vidpunktoj. Oni malaperigis tiun kontraŭecon, kaj la kolektiva malamo ŝanĝiĝos - ne en amon - sed en reciprokan toleremon aŭ indiferentecon. Se la starigo de pli bona ordo postulas unue, ke ĉiuj homoj sin konsideru kiel fratojn, oni povus atendi kelkajn jarmilojn. Feliĉe la plenumo de tiu morala perfektigo ne estas necesa. Por forigi la militsistemon, la homoj ne bezonas fariĝi anĝeloj, kaj, ĝin forjetinte, ili ankaŭ ne fariĝos anĝeloj. Inter individuoj samlandaj aŭ diverslandaj, inter grupoj kaj partioj, regos - poste kiel antaŭe - malamoj, envioj kaj konkuroj, el la kontakto de malsamaj interesoj, apetitoj, temperamentoj.

La ideo pri ordo internacia estas do sendependa de la morala postulo pri homa frateco. Tiu diferencigo estas tre simpla. Tamen, oni bedaŭrinde ankoraŭ ofte konfuzas ambaŭ ideojn. Tiamaniere, la en si mem komplikan problemon de la tutmonda paco oni ankoraŭ plikomplikigas, farante el ĝi nur parton de pli vasta morala problemo, kies solveblecon ni ne povas klare imagi. Ĝi tiam aperas kiel pure utopia celado de malgrandaj sektoj, kiuj konsistas ofte el tre noblaj homoj, sed, bedaŭrinde, forportite de la revoj kaj lulate de mistikaj esprimoj, ne plu konscias pri la realeco.

Ni aludis pri la vidpunkto, kiu dependigas la starigon de paca ŝtato el individua reformo, t.e. el demando pri moralo. Similan absolutan karakteron havas la tezoj, kiuj kredigas, ke senmilita ordo estos ebla nur post radikala transforino de nia socia organizo konforme al la doktrinoj de iu partio.

Nur kelkajn ekzemplojn ni citos.

Multaj personoj ankoraŭ opinias, ke la ekonomiaj faktoj determinas ĉiujn sociajn fenomenojn, eĉ la plej altgradajn. La materiaj interesoj regas la historion. La militoj estas do la rezultato de ekonomiaj konfliktoj. Nuntempe, la socio estas organizita tiel, ke ĝi estas sub la plena estreco de la kapitalistaj klasoj. Sekve, la militoj, sub kiu ajn belŝajna preteksto ili estas farataj, havas fakte kapitalistan devenon. Ili malaperos, nur kiam estos transformita la socia ordo, kiu ilin naskis. La defendantoj de tiu tezo, ĉe ĉiu milito penas pruvi, ke ĝi estas kaŭzita de ekonomiaj faktoroj kaj estas klarigebla per kontraŭaj interesoj de diverslandaj kapitalistaj grupoj.

Tiu doktrino, kiu renkontis grandan sukceson, havas la meriton, ke ĝi estas simpla. Sed pri sociaj fenomenoj oni devas singardeme rilati kun la simplaj unukaŭzaj klarigoj. Certe, la ekonomiaj faktoj estas la necesa fundamento de nia civilizacio. Por ke li povu pensi kaj labori, la homo devas unue manĝi. Sed tio tute ne signifas, ke nur la ekonomiaj faktoj determinas la historion, ne pli ol nur fiziologiaj bezonoj movas la homon. Oni povas allasi, ke kelkaj militoj havis kiel ĉefajn motivojn konfliktojn pri materialaj interesoj. Tamen, sole ekonomiaj malkonsentoj ne sufiĉas por elvoki militon. Sentimentalaj kaj ideaj elementoj ĉiam enmiksiĝas kaj plej ofte superregas. Eĉ atentante nur pri la tutlasta epoko, ni facile konstatas, ke la Balkanaj konfliktoj kaj la nuna militego ne estas ĉiufanke klarigeblaj per la nomita teorio. Ili neniel estas la produkto de kapitalista ordo. Ilin kaŭzis politikaj malkonsentoj, kies radiko kuŝas en la demando pri nacieco, t.e. precipe spirita faktoro.

Flanke de la ekonomiaj bezonoj, la ideoj kaj la sentoj movas la popolojn, same kiel ili movas la homojn. Ke la kapitalistaj rondoj havas ĉe la gvidado de la ŝtatoj gravan influon, neniu neas. Tiu influo ne estas senlima. Multe malpli forta ĝi estas ol la premanta influo de tiuj naciaj sentoj prilaboritaj de la generacioj kaj enradikigitaj en la animoj. Kontraŭ la eksplodoj de tiuj sentoj ofte devas cedi la kapitalistaj rondoj. Lastaj historiaj ekzemploj montras ĝin.

Certe, plej ofte la intereso de la kapitalistoj - krom de kelkaj el ili speciale implikitaj en la militindustrioj - postulas ne la militon, sed la pacon, kaj ili ĉion faras por ĝin konservi, ĉar nur en la sekureco povas disvolviĝi la grandaj iniciatoj kaj la vastaj entreprenoj. Se tamen ili ne povas eviti la militon, tio okazas, ĉar ilia potenco, kiel ajn granda ĝi estas, estas superata de pli forta potenco, esence spirita. Milionoj da homoj nun, ofte senplende, suferas plej kruelan sorton, ne ĉar ili celas propran materian intereson au eĉ la ekonomian bonstaton de sia patrujo, sed ĉar ili kredas defendi spiritajn bienojn (libereco, rajto, kulturo, patrujo ktp.). Ĉu ili tion reale faras, estas alia demando. kio nin okupas, sufiĉas konstati, ke ili kredas ĝin.

Tiuj faktoj ne ĝenas la fervorajn defendantojn de la tezo pri tutpotenco de la ekonomiaj faktoroj. Anstataŭ allasi, ke la teorio ne klarigas ĉion kaj sekve estas nur parta vero, ili preferas nei certajn

problemojn, ekz. tiun de la nacieco, kaj entute ĉiujn faktojn, kiuj kontraŭstaras la dogmaron. Sed la evidenteco iom post iom malblindigas tiujn, kiujn kaptis la simpleco de la klarigo. Sub la influo de la nunaj cirkonstancoj, oni forlasas tiun doktrinon, kiu je sia apero havis bonan efikon per tio, ke ĝi atentigis pri la tro malzorgita ekonomia vidpunkto, sed poste pro sia rigideco ne plu povis ampleksi la multflankan realecon.

Laŭ la supra vidpunkto, la starigo de paca ordo internacia estus la rezulto de plena socia transformiĝo. Aliaj movadoj, ne tiel absolutaj, tamen pretendas, ke la pacproblemo estos vere solvebla nur post kiam estos realigita la socia, kultura aŭ politika reformo, al kiu ili celadas. Ekzemple, fervoraj feministinoj asertas, ke kontraŭ la militsistemo nenio serioza estos farebla antaŭ ol la virinoj havos voĉdonrajton. Alia movado substrekas, ke la problemo solviĝos per racia limigo de la naskiĝoj. Iuj Esperantistoj volus, ke ĉiuj homoj lernu Esperanton; poste, la paco starigos per si mem ktp. Tiuj vidpunktoj estas malsamaj. Ili tamen koincidas en tio, ke la demando pri paco ne povas esti ekzamenata kaj solvata en si mem, sed postulas unue la efektivigon de iu socia reformo aŭ progreso.

Al tiuj tendencoj oni povas riproĉi, ke ili ne klare vidas la ĉefan karakteron, esence politikan, de la pacproblemo, kaj tro inklinas konsideri ĝin tra specialaj teorioj aŭ celadoj, kiuj ne rekte rilatas kun la postulo de nova ordo internacia.

Povas esti, ke la virina voĉdonrajto malfaciligos la militon, sed tio tute ne estas tiel certa, kiel pretendas kelkaj viringrupoj. Unue, la eksterlanda politiko estas ĝis nun malmulte influita de la parlamentoj. La estonteco de la ŝtatoj estas fiksata de pli intimaj rondoj, kiuj, pro ŝtatintereso, plej ofte sekrete laboras kaj komunikas al la parlamentoj nur tion, kio estas sendanĝere komunikebla. Ĉu tio estas bona aŭ ne, ni tion poste ekzamenos. valoras la fakto, ke ĝis nun la karaktero de la eksterlanda politiko evitis la parlamentan partoprenon. Por ke la voĉo de la virinoj efiku, necesus do, ke la parlamentoj havu ĉiopovan influon je la ekstera politiko - kio postulas per si mem profundajn reformojn apenaŭ realigeblajn en la nuna stato. Due, ekzistas multaj pacifistaj virinoj, sed ankaŭ ŝovinistaj virinoj ne mankas. Eĉ, ofte, laŭ influo de la cirkonstancoj, fervoraj pacifistinoj fariĝas ne malpli fervoraj ŝovinistinoj. Verdire, oni asertas, ke pro sia patrineco la virinoj estus ĉiam nature inklinaj al la paco. Sed la plimultaj viroj ankaŭ amas siajn filojn, kaj malgraŭ tio restas militemaj. Fine, eĉ se oni akceptas, ke la virina voĉdonrajto faciligas la pacon, oni devas allasi, ke praktike ĝi ne estas nun samtempe aplikebla ĉiulande. El tio rezultus do la jena stato: kelkaj landoj havus virinan voĉdonrajton kaj sekve - laŭ la feministinaj asertoj montrus pacifistan politikon; aliaj ne havus ĝin kaj konservus militeman politikon. La historio pruvas al ni, ke tiu situacio estas danĝera precipe por la pacemaj landoj, ĉar la pacifismo unuflanka estas nur trompiĝo.

Tiuj rimarkoj tute ne celas kondamni la feministan celadon - kiu en tiom da aliaj rilatoj estas akceptinda - sed nur montri, ke je la pacproblemo la virina voĉdonrajto ne povas havi la ĉefgravan influon, kiun al ĝi aljuĝas ĝiaj plej fervoraj apostolinoj.

La tezo pri la rilatoj de la militoj kun la problemo de la kresko de la loĝantaro ne estas tute malatentinda, ĉar iam la troloĝateco de kelkaj landoj povus fariĝi kaŭzo de militoj, sed ĝis nun la konfliktoj havis tute aliajn motivojn. Tial, la solvo, kiun oni prezentas, ne efikas rilate al la estantaj kondiĉoj. Plie, tio, kion ni diris rilate al la pacema feminismo unuflanka estis ankoraŭ pli vera rilate al la unuflanka limigo de la naskiĝoj: La popoloj, kiuj praktikus la limigon, estus la viktimoj de tiuj, kiuj ne praktikas ĝin. La nomita

teorio estus sendanĝere aplikebla, nur se ĉiulande ĝi estus egalgrade akceptita. Tio ne estas realigebla nuntempe.

Rilate al la tria donita ekzemplo, la ĝenerala disvastigo de Esperanto certe plifaciligos la interpopolajn rilatojn kaj ebligos iom post iom la formiĝon de supernacia kulturo. Sed krom tio ke tiu grandega tasko estos tre longedaŭra, ĝi estas realigebla nur se la politikaj internaciaj kondiĉoj ne malhelpas ĝin starigante ĉiuspecajn barojn inter la popoloj kaj eternigante la plej krudajn antaŭjuĝojn. Tie ankaŭ la ordo estas kondiĉo de la progreso. Aliajn similajn doktrintendencojn ni povus citi.

La donitaj ekzemploj sufiĉas por montri, ke la priparolitaj celadoj ne povas solvi la pacproblemon, ĉar ili malatentas ĝian ĉefan karakteron.

Ni traktis tiujn vidpunktojn teorie. Praktike, estas evidente, ke ĉiuj antaŭe cititaj movadoj ne estas sufiĉe potencaj por trudi siajn ideojn al la mondo. Plie, la solidarigo de la pacoceladoj kun apartaj idealoj aŭ teorioj, ofte vigle kontraŭbatalataj, havas aliajn praktikajn malprofitojn en tio, ke ĝi forpuŝas multajn personojn. Oni ja povas esti kontraŭ la virina voĉdonrajto kaj por la paco. Oni povas esti kapitalisto kaj kontraŭ internacia anarkio, k.t.p. La pacproblemo estas mem sufiĉe grava. Ĝi ja povas esti ekzamenata en si mem. Oni do ne miksu ĝin kun aliaj doktrinoj, je kiuj ĝi ne estas nature ligata.

Ni havas sub la okuloj broŝuron dediĉitan al la pacproblemo; ĝi estas tipo de tiu evitinda konfuzo. En ĝi la aŭtoro pritraktas kaj solvas ĉiuspecajn sociajn problemojn; socialismo, religioj, feminismo, eŭgeniko, alkoholo, lingvo internacia, k.t.p. Ligi ĉiujn tiujn demandojn, el kiuj la plej simpla (la alkohola problemo) elvokas la plej terurajn malhelpojn, signifas prokrasti ĉiun solvon ĝis kelkaj jarcentoj. Tia konfuzo senefikigas agadon, kiu estus bonfara, se ĝi scius sin limigi. Estas eraro de nia epoko, ke ĝi disigas sian socian klopodadon je multaj diversaj celoj samtempe. En la nuna tempo unu problemo superregas ĉiujn aliajn, nome la starigo de internacia ordo. Antaŭ ol plibonigi la kondiĉojn de la vivo, necesas unue, ke la vivo estu. Nu, la internacia anarkio grave endanĝerigas nian vivon kaj minacas la kulturvalorojn akiritajn de la antaŭaj generacioj. Savi la civilizacion estas la unua devo; poste plibonigi.

Elimininte la absolutajn doktrinajn solvojn, ni do estas alkondukitaj al la konkludo, ke la paca problemo devas esti ekzamenata en si mem. Ni tiam konstato, ke ĝi havas precipe politikan kaj juran karakteron. Ni skribas precipe kaj ne ekskluzive. Ordo internacia dependas ankaŭ parte el certaj materiaj kondiĉoj, kiel sufiĉe rapida komuniĝo inter la nacioj, parte el spiritaj kondiĉoj kiel reciproka konatiĝo.

Internacia ordo estus malfacile kreebla antaŭ kelkaj jarcentoj, kiam la komunikoj inter la diversaj regnoj estis tre malfacilaj kaj interne de ili la sekureco ofte tre malfacila. Sed, koncerne tion, la situacio tute ŝanĝiĝis en la lastaj jardekoj. La rilatoj inter la diversaj partoj de Eŭropo estas nun pli rapidaj kaj pli praktikaj ol ili estis antaŭ cent jaroj interne de unu el la nunaj grandaj landoj, kaj aliparte la disvolviĝo de la moderna ŝtato notinde pliigis la internan sekurecon. El la unua fakto kelkaj verkistoj, tro influitaj de la teorio pri la tutpotenco de la materiaj faktoroj, konkludis, ke la progreso de la komunikoj, faciligante la reciprokajn konatiĝojn de la popoloj, pli kaj pli maloftigos la militojn. Tio estis iluzio. Pli bone konante unu la alian, la popoloj havas okazojn ne sole por kunlabori, sed ankaŭ por konflikti. La fervojoj, la rapidaj ŝipoj, la telegrafio multe plivastigis nian materian agadkampon, sed ili ne determinis novan pensmanieron. Oni do ne povas diri, ke la progreso de la komunikoj, eĉ kun siaj ekonomiaj konsekvencoj, plifortigas la internacian

pacon; sed estas allaseble, ke paca stato ne povas esti firme starigata, se la materiaj rilatoj inter la popoloj ne estas sufiĉe oportunaj.

Spirita komuniĝo estas ankaŭ necesa kondiĉo. Rilate al la demando pri kulturo, multaj diverslandaj kleruloj skribis plej fantaziajn asertojn. Se oni atentus pri iliaj pasiaj demonstracioj, oni devus konsenti, ke nur la nacio, al kiu ili apartenas, kaj ĝiaj kunligitoj, posedas indan kulturon. La malamiko povas esti nur barbaraj, degenerintaj aŭ malheroaj. Ĉar tiuj strangajoj estas similaj ambaŭflanke de la landlimoj, ili sin reciproke detruas. Oni do povas serene allasi, ke pri la grado de kulturo aŭ malkulturo, la popoloj militantaj ne tiel diferencas kiel oni pretendas, laŭ la plej malsamaj direktoj. Fakte, se oni atentus pri la civilizitaj nacioj kune, oni devas akcepti, ke ili havas vastan idean kaj moralan komunposedaĵon, kiu estas la verko de la ĉiutempaj kaj ĉiulandaj elitoj. La diversgentaj kulturoj rilatas al la komuna civilizacio, kiel la brandoj al la trunko. Ili ne povas tute memstare disvolviĝi. Oni povas ilin kompari, sed ne ilin kontraŭstarigi. Internacia ordo ja tute ne postulas la kunfandiĝon de la diversgentaj kulturformoj, kiuj kontraŭe devas libere flori konforme al sia propra originaleco, produkto de meza kolektiva sentemo. Sed necesas, ke rilate al ili regu reciproka tolerado. Faciligigi la konatiĝon inter diverslandanoj, starigi kontakton inter la kulturoj, ebligi liberan interŝanĝon de pensoj super la naciaj baroj, estas taskoj gravaj per tio, ke ili helpas al la ellaboro de sentoj, kiuj cementos kaj firmigos la novan ordon. Antaŭ la milito, floris bela promesplena internaciema movado, kiu manifestiĝis per multnombraj internaciaj asocioj, institucioj, kongresoj k.t.p. Ĝi estas nun grandparte disigita de la militventego. Sed ĝi revivos, ĉar ĝi respondas al nepra bezono de nia epoko. Tamen, la laboro, kiun ĝi plenumas, efikas nur je longa tempo kaj ĉe limigitaj randoj; la kernon de la popoloj, la mezan parton de la naciaj publikoj ĝi ne ankoraŭ tuŝis. Plie, la prospereco de tiu libera movado ĝuste dependas de la politika internacia situacio. Se tiu ĉi restas en la anarkia ĥaoso, se konstante nin minacas tia aŭ alia militdanĝero aŭ politika streĉiĝo, tiam ĉiuj progresaj celadoj estas paralizitaj, larĝaj pianoj kaj ampleksaj iniciatoj restas nerealegeblaj pro la ĝenerala malsekureco. Atendi ĝis tiuj internaciaj organizaĵoj estos sufiĉe potencaj por mem trudi la pacon, estas espero ne tute forpelinda, sed kies efektivigo aperas tre malproksima. Kontraŭe la formigo de interŝtata ligo grandege helpus tiujn internaciemajn kulturceladojn, kiuj dank' al politika sekureco povos disvastigi tiom pli facile, kaj alvarbi tiujn multajn laboremajn spiritojn ĝis nun ekskluzive implikitajn en la politikaj bataloj.

Tial, ni estas rekondukitaj al la fundamenta demando pri ordo internacia: problemo precipe politika kaj jura.

Antaŭ ol ekzameni la politikajn solvojn prezentitajn, konvenas atentigi, ke ni ne uzos abstraktajn esprimojn, per kiuj multaj personoj kredas solvi la malfacilaĵojn. Starigi super la mondo la regadon de la libereco, de la rajto aŭ de la justeco, estas frazeologio, kiu tute nenion solvas. Ĉiuj militantoj sincere opinias batali en la nomo de tiuj idealoj, sed pri la interpretado kaj aplikado, iliaj vidpunktoj diferencas, kaj ĝuste tio estas la ĉefa afero.

Diri, ke la popolo A. batalas por la rajto signifas nenion, ĉar ankaŭ la malamika popolo B. kredas batali por la rajto, t.e. la rajto, kiu ŝajnas al ĝi prava. Niaj ideoj kaj sentoj pri libereco, justeco, rajto, - tion oni scias - ne estas samaj. Ili diferencas ne sole laŭ la popoloj, sed interne de la popoloj laŭ la religia aŭ filozofia kredo, laŭ la partioj, laŭ la medio k.t.p. Dum interne de la nacioj, flanke de la natura diverseco de la vidpunktoj, la necesajoj de la komuna vivo trudi la alprenon de pozitivaj principoj laŭ kiuj reguliĝas la sociaj rilatoj, internacie, kontraŭe, ekzistas nenia pozitiva principo laŭ kiu reguliĝas la interŝtataj rilatoj, sed

nur malsamaj vidpunktoj, inter kiuj tranĉas la forto, pro manko de alia rimedo. La esprimoj libereco, justeco, rajto k.a., akiras pozitivan signifon, nur se ili estas precizigataj kaj limigataj, t.e. rilatigataj al faktoj. Alie, ili malklarigas ĉiun ekzamenadon, ĉar abstrakte uzataj ili elvokas malsamajn komprenojn, kaj malhelpas tiujn praktikajn interkonsentojn, al kiuj - malgraŭ teoriaj diferencoj - kondukas la necesajoj de la socia vivo. Ni scias, ke tiaj esprimoj respondas al certaj ĝeneralaj bezonoj de nia penso, sed kiam oni volas transiri al la agado, estas necese paroli pri konkretaĵoj. Al konstruanto de domo ne sufiĉas scii, ke la konstruaĵo devas esti alta; li bezonas scii, kiom alta. Ke la mondo estu regata laŭ la libereco, la rajto kaj la justeco, estas komuna deziro. Sed kiel esprimi tion en la realeco? Kiel atingi kompromison kaj vivkapablan ekvilibron, inter la malsamaj komprenoj, kiujn elvokas tiuj esprimoj? Jen la malfacila demando, kiu premas la serĉanton. Ĝin ili povas ektuŝi nur kiam lia spirito, sin liberiginte je tiuj abstraktaĵoj, enpenetras la vivrealecon.

III *Esperanto* (UEA) N-ro 181 / 1915

La pacifistaj solvoj

Forĵetinte la absolutajn doktrinajn solvojn, ni nun povas ekzameni la proponojn de la pacifismo, kiu substrekas la politikan kaj precipe juran karakteron de la problemo. Kvankam ofte malsamaj pri detaloj, la pacifistoj estas unuanimaj rilate al la fundamenta principo de sia celado, t.e. la juĝado de ĉiuj interŝtataj konfliktoj per arbitracio. Krom tio aperas en ilia agadprogramo aliaj postuloj, ekzemple: neniigo aneksado kontraŭ la volo de la enloĝantoj, limigo de la armadoj, nuligo de la sekretaj traktatoj, malpermeso de ĉiu ataka aŭ defenda kunligo, senkaŝa diplomatio, libera komerco en la kolonioj k.t.p. Ni momente lasu flanke tiujn proponojn kaj okupu nin pri la arbitracia demando, kiu estas la kerno de la pacifisma celado.

Kio estas arbitracio? Oni povas ĝin difini la juĝo pri malkonsento per tria persono elektita de la kontraŭuloj. En la internaciaj aferoj, la arbitracio estas procedo uzata de la ŝtatoj, kiuj interkonsente petas iun (personon, registaron aŭ tribunalon) por decidi per juĝo, kiun ili promesas akcepti, ĉu pri difinita malkonsento, kiun ili ne povis solvi per senperaj traktadoj, ĉu pri fiksita speco de malkonsentoj, ĉu pri ĉiuspecaj eventualaj malkonsentoj. En la unua okazo oni ĝin nomas arbitracio okaza; en la du aliaj, arbitracio konstanta. Tiu ĉi povas esti fiksata per du specoj de traktatoj: 1^o Kiam du ŝtatoj kontraktas pri iu ajn temo (ekzemple, traktatoj pri komerca, literatura kaj industria propraĵo, ekstradado, k.t.p.), ili povas fiksi, ke ĉiuj malkonsentoj pri la interpretado kaj aplikado de la traktato estu juĝataj arbitracie. 2^o Du ŝtatoj povas konkludi ĝeneralan arbitracian traktaton, laŭ kiu ili promesas juĝigi arbitracie ĉiujn eventualajn konfliktojn pri kiu ajn temo. Tamen, preskaŭ ĉiuj ĝisnunaj tiaj traktatoj esceptigas el arbitraciebleco la demandojn pri honoro, vivintereso kaj sendependeco de la kontraktintaj regnoj.

La arbitracia procedo, ĉu en specialaj, ĉu en ĝeneralaj aplikoj, estas konata kaj uzata jam de antikva tempo. Ekzemple, en la jaro 418 antaŭ Kristo, la Konfederacio de Argoso kaj Sparto en Grekujo konkludis traktaton, laŭ kiu ili promesis arbitraciigi ĉiujn okazoblajn konfliktojn, eĉ pri landolimoj. Oni rimarku, ke tiu ĉi traktato estas pli ampleksa ol la modernaj konvencioj, kies restriktioj ebligas al la ŝtatoj ne prezenti al arbitracio la gravajn teritoriajn demandojn. Sed precipe en la dua parto de la XIXa jarcento kaj en la komenco de la XXa, plimultiĝis la arbitraciaj kondiĉoj kaj la arbitraciaj traktatoj. Multaj internaciaj traktatoj

enhavas arbitracian kondiĉon. Plie, ĝis 1915 estis konkluditaj 197 interŝtataj arbitraciaj traktatoj. En 1907, la unua Haga Pac-Konferenco akceptis i.a. konvencion por la paca reguligo de la internaciaj konfliktoj; krom tio, por plifaciligi la uzadon de tiu procedo ĝi starigis Konstantan Arbitracian Kortumon, kiu ĝis 1915 decidis pri 15 konfliktoj. Ĉe la dua Haga Konferenco (1907) estis ellaborita konvencio pri deviga arbitracio, laŭ kiu la ŝtatoj promesis arbitraciigi ĉiujn konfliktojn, krom pri sendependeco kaj nacia honoro, sed ne povinte atingi unuaniman konsenton de la ŝtatoj, tiu konvencio restis projekto. La pacifistoj esperis, ke kun la tempo kaj la sperto, la ŝtatoj kutimiĝos uzi tiun procedon, kaj venos tago, kiam inter ĉiuj regnoj estos konkludata ĝenerala deviga arbitracia konvencio sen limigo. La laŭvola kaj limigita arbitracio estis konsiderata kiel paŝo al senlima deviga arbitracio.

La arbitracio pri interpretado aŭ aplikado de internacia konvencio povas esti praktika juĝprocedo, sed rilate al la pacproblemo ĝi ne estas grava. La internaciaj traktatoj ĝenerale rilatas al juraj aŭ teknikaj demandoj, kiuj, kvankam gravaj en si mem, ne elvokas militojn. Eĉ sen arbitracio tiuj demandoj estus solveblaj diplomatie, eble multe malpli rapide, sed tamen sen sangoverŝado.

La graveco de la ĝisnunaj arbitraciaj traktatoj ne devas esti trotaksata. Ilia nombro ŝajnas alta, sed se oni atente ekzamenas ilian nomaron, oni konstatos, ke preskaŭ ĉiuj traktatoj estis konkluditaj ĉu inter ŝtatoj politike amikaj, ĉu inter ŝtatoj, kiuj pro nenajbareco ne povus intermiliti. Ekzemple, en la lastaj jaroj, Francujo kaj Britujo politike interkonsentis; sekve de tio, estis konkludita inter ili arbitracia traktato, kiu cetere enhavas la kutimajn limigojn. La traktato inter Argentino kaj Ĉilio, pri kiu oni multe parolis, sekvis la politikan alproksimiĝon, kiu ebligis la solvon de la teritoriaj konfliktoj inter ambaŭ landoj. En tiuj okazoj, la arbitracia traktato tute ne estas la kaŭzo de amikigo, sed la konsekvenco. Kiam du ŝtatoj sukcesis diplomatie forigi certajn malkonsentojn, ili ofte subskribas arbitracian traktaton, kiu fakte estas kvazaŭ konfirmo de la politika reakordiĝo.

La aliaj traktatoj estis konkluditaj inter ŝtatoj, kiuj sekve de la geografiaj kondiĉoj ne havas okazon por grava politika malkonsento; tiaj estas ekz. Svisujo kaj Ĉilio, Danujo kaj Nederlando, k.t.p. Oni allasos, ke eĉ se ili tion dezirus tiuj ŝtatoj ne facile povus intermiliti! En tiuj okazoj la arbitraciaj traktatoj ne garantias la pacon, kiu eĉ sen tio ne povus esti rompata.

Aliparte oni ne forgesu, ke preskaŭ ĉiuj traktatoj forigas el la arbitraciebleco la konfliktojn, pri kiuj la registaroj opinias, ke ili koncernas la honoron, la vivinteresojn aŭ la sendependecon de la nacio. Tiuj limigoj estas ekstreme gravaj. Ili fakte signifas, ke la ŝtatoj konsentas arbitraciigi nur la negravajn malkonsentojn, kiuj eĉ sen la arbitracia juĝo ne eligus la gĵavojn. Efektive, neniam militoj fariĝis pro nura malkonsento pri interpretado de formala juro; je ilia origino ĉiam troviĝas politika malkonsento, t.e. demando pri influo.

Nu, ĉian similan demandon la ŝtatoj tre facile povas malsubmeti al arbitracio, asertante, ke ĝi koncernas la honoron, la vivinteresojn aŭ la sendependecon de la nacio. Tiel agos la partio, kiu sin kredas la pli forta, kaj sekve konjektas, ke ĝi atingos pli multe per la impono de sia forto ol per arbitracio.

Cetere, nenio estas pli elasta kaj malpreciza, ol la supraj esprimoj? Kio estas nacia honoro? Tre malfacile difinebla koncepto, ĉar en la daŭro de la historio, plej malsamaj kaj kontraŭaj agoj estis plenumitaj en ĝia nomo, Plej ofte ĝi signifas: ne cedi, kiaj ajn estas la pravigoj de la kontraŭuloj. La esprimo

‘vivinteresoj’ estas ekstreme oportuna, ĉar ĝi permesas al unu el ambaŭ partioj rifuzi la arbitracion laŭ ĝia plaĉo; por tio sufiĉas, ke ĝi aljuĝu al la konflikto ‘vivinteresan’ gravecon. Nuntempe la milito estas tia operacio, ke neniu ŝtato kuraĝas ĝin riski pro bagatelaĵoj. La sangaj konfliktoj okazas do nur kiam ŝtato, prave aŭ malprave, opinias, ke ĝiaj vivinteresoj estas minacataj. Ĝuste en tiu okazo la arbitracio ne povas utili. Fine, la limigo pri nacia sendependeco signifas, ke neniu ŝtato povas konsenti pri malpliigo de sia suvereneco; ĝi nome ne povas toleri, ke alia regno starigu pretendojn pri parto de ĝia teritorio aŭ enmiksiĝu en ĝiajn internajn aferojn. Nu, la historio montras, ke preskaŭ ĉiuj militoj okazis pro teritoriaj kaj naciecaj pretendoj. La supre nomitaj limigoj senefikigas la arbitracion de ĉiuj konfliktoj, kiuj estas kapablaj naski militon. Ni scias, ke la pacifistoj mem kontraŭstaras ĉian limigon. Tamen, ĉar, antaŭ la nuna milito, multaj el ili alte taksis la progresojn de la arbitracia procedo, estis utile montri, ke ĉio ĝis nun farita laŭ tiu vojo ne helpas al la solvo de la pacproblemo.

La forigo de la ĝisnunaj limigoj, ŝajne, estus grava progreso. Al tiu rezultato celas la pacifistaj klopodoj. Sed oni ne devas malatenti, ke tia faro renkontus gravajn malhelpojn, ĉar ĝi fakte havus kiel konsekvencon, plene ŝanĝi la politikon de la ŝtatoj, kaj limigi ilian sendependecon, kiu estas la bazo de la nuna ŝtato internacia. Iuj pacifistoj ŝajnas allasi, ke sufiĉus forigi el la arbitraciaj traktatoj la frazeron pri la supre aluditaj limigoj, por ke, dank' al tio, la internacia socio vere ekzistu kaj la milito estu forigata. Tio estas iluzio je la tutpotenco de la tekstoj kaj formuloj. Estas naive kredi, ke grandega ŝanĝo en la mondpolitiko povas okazi mekanike, preskaŭ nesciate, nur per modifo de tekstoj, se la ideoj, sur kiuj bazas la nuna ordo, ne antaŭe transformiĝis. Tia opinio ankoraŭ regas ĉe multaj militkontraŭuloj. Ili imagas, ke la problemo estas solvebla nur per eksteraj rimedoj kiel la konkludo de la arbitraciaj traktatoj, la prilaboro de arbitraciaj regularoj, la starigo de tribunaloj, dum ili aliparte daŭrigas respekteme akcepti ĉiujn ideojn, kiuj firmigas la militsistemon, kaj inter ili la ideon pri nacia sendependeco, al kiu ligiĝas ĉiuj aliaj.

Sed la arbitracio renkontas ankaŭ alispecajn malfacilaĵojn, kiujn ni devas tiom pli konsideri, ke ili tuŝas la esencon de la pacproblemo.

Ni supozu, ke la ŝtatoj sin devigis submeti al arbitracio ĉiujn ajn konfliktojn, sen limigo. Ni asertas, ke eĉ en tiu okazo la problemo tute ne estas solvita.

El la historio ni scias, ke la konfliktoj pri interpretado de jam fiksataj juraj punktoj, pri aplikado de jura aŭ teknika traktato aŭ eĉ pri ekonomiaj malkonsentoj ne povas per si mem naski militon. Tiuj konfliktoj nuntempe solviĝas ĉu per senperaj traktadoj, ĉu lastokaze per arbitracio. Kiam la malkonsentoj rilatas al demandoj pri formala juro, juristoj estas kapablaj ilin solvi, bazante sur la ĝisnuna internacia juropraktiko aŭ sur la juroscienco. Kiam la malkonsentoj koncernas ekonomiajn demandojn, meza solvo povas esti atingata per reciproka marĉandado. Sed tute alie estas kiam la interŝtataj malkonsentoj havas politikan karakteron, ekzemple kiam ili rilatas al demandoj pri nacieco, ekspansio, kolonioj. Tie la demando ne plu estas pri interpretado de ekzistanta juro aŭ pri marĉandado je neĉefgravaj disputoj, sed pri malsamaj fundamentaj jurkomprenoj. Por ke arbitracia instanco ankaŭ povu solvi la politikajn konfliktojn, necesus do, ke ekzistu internacia pozitiva juro fiksanta la rajtojn de la popoloj kaj la rilatojn inter la ŝtatoj. Ĝis nun, la internacia juro ekzistas nur en la formo de kelkaj pure empiriaj reguloj pri kelkaj formalaj interŝtataj rilatoj, kaj de internaciaj diverstemaj konvencioj, havantaj teknikan, sed ne politikan, karakteron. Tiu embria internacia juro cetere ne havas sankcion, kaj en tiu rilato ĝi ne povas esti konsiderata kiel vere pozitiva juro. Ĝi ĉiuokaze ne povas utili por la juĝado de politikaj konfliktoj, ĉar pri tiaj politikaj rilatoj ĝi ankoraŭ ne

ekzistas. Interne de sama regno, la rilatoj inter la individuoj, kaj inter la ŝtato kaj la individuoj, estas fiksataj per leĝoj kaj reguloj, kies kolekto formas veran pozitivan juron, kiu per sankcioj devigas ĉiun regnanon je alkonformiĝo. La publika nacia rilataro estas do plene organizita. Kontraŭe, la internacia rilataro restas en ĥaosa anarkia stato, ĉar la suverenaj ŝtatoj estas subordinataj al neniuj supera potenco kaj rekonas la internaciajn regulojn, kiujn trudas la komuna vivado, nur tiom, kiom ili estas akordigeblaj kun la naciaj interesoj - sola kriterio.

La necesa kondiĉo por la funkciado de arbitraciaj tribunaloj estas do la ellaboro de internacia pozitiva juro, kiu rezultos el la akordiĝo je certaj fundamentaj principoj pri la popolrajtaj kaj la interŝtataj rilatoj.

Oni eble asertos, ke ekzistas universala natura juro, kiu estas la supera regulo tiel de la nacioj kiel de la individuoj. La arbitracia instanco povus do juĝi la konfliktojn bazante sur la jam formulita internacia juro aŭ, se tio ne sufiĉas, sur la principoj de natura juro, kiu rezultas el komune homa sento pri justeco. Sed pri vera juro oni povas paroli, nur se ĝi ekzistas en la formo de precizaj kaj komune akceptitaj (aŭ truditaj) reguloj, kiujn juĝantoj aplikos je la solvo de konfliktoj. La tiel nomata natura juro estas tro malcerta, tro konfuzita de la malsamaj homaj komprenoj, por ke ĝi povu esti uzata kiel regulo por solvi la internaciajn konfliktojn. La tribunalaj decidoj, kiuj estus alprenataj ne laŭ pozitive firme fiksita juro, sed laŭ la montraroj de la natura juro, estus elmetataj je ĉiuspecaj kritikoj, kia ajn estas la supozata senpartieco de la juĝantoj.

Oni povus aliparte kontraŭdiri, ke la internacia pozitiva juro povus esti empirie ellaborata de la arbitraciantaroj mem. Ĝi tiel estus iom post iom fiksata laŭ la spertoj. Tiu solvo estas ebla kaj eĉ fruktodona rilate al fundamentaj jurprincipoj. Kiel interne de la ŝtato la tribunaloj ne devas mem ellabori la leĝojn, laŭ kiuj ili juĝos, tiel same, internacie, la arbitraciaj tribunaloj ne devas fiksi la jurprincipojn, laŭ kiuj ili solvos la interŝtatajn konfliktojn. Fiksi kaj apliki la juron estas du malsamaj funkcioj, kiujn ne povas plenumi la sama organo.

Ĉiu internacia juĝpovo necesigas do internacian pozitivan juron, sekve antaŭan akordiĝon je certaj fundamentaj principoj pri la popolaj kaj ŝtataj rilatoj. Tiuj principoj, ni tion poste vidos, kontraŭstaras al la ideoj, sur kiuj bazas la monda politiko. Antaŭ ol krei arbitraciajn tribunalojn, transformiĝo de la politikaj ideoj estas necesega.

Alia kondiĉo estas ne malpli necesa je la funkciado de internacia juĝopovo, nome la ekzistado de efika sankcio. La malfacileco, solvi tiun demandon sufiĉas por serioze dubigi pri la praktikebleco de la arbitracio en la nuna internacia stato. La plimultaj pacifistoj respondas - aŭ almenaŭ respondis, ĉar la milito versajne severe instruis pri tio -, ke la demando pri sankcio ne estas tiel malfacile solvebla kiel ĝi ŝajnas. El la ĝisnunaj faktoj rezultas, ke ĉiuj alprenitaj arbitraciaj decidoj estis senescepte akceptitaj de la koncernaj regnoj. Cetere, eĉ se la ŝtato rifuzus sin submeti al arbitracia juĝo, la aliaj ŝtatoj - asertas la pacifistoj - povus efike agi, rompante kun ĝi la rilatojn kaj se bezone ĝin bojkotante. Multaj pacifistoj eĉ kredas, ke la premado de la publika opinio sufiĉas, kaj ke neniuj ŝtatoj kuraĝis kontraŭstari la tutmondan konsciencon rifuzante akcepti la internacian juĝon.

Tiu rezonado saĝas al ni netrafa. El la ĝisnuna sperto oni povas eltiri nenian konkludon. Vi scias, ke la arbitracio ĝis nun funkciis pri neĉefgravaj demandoj. Estas do facile kompreneble, ke la ŝtatoj submetiĝis

je la juĝo, ĉar konsentante je la arbitracio, ili mein antaŭkalkulis la maksimumon, kiun ili povas perdi, kaj tiu maksimumo ŝajnis al ili ne primilitinda. Ni jam rimarkis, ke la nepolitikaj konfliktoj jam nun oportune povas esti solvataj arbitracie. Sed alie estas pri politikaj demandoj, al kiuj, prave aŭ malprave, la ŝtatoj aljuĝas ekstreman gravecon. Tiuokaze sin trudas la neceseco de sankcio sufiĉa por absolute obeigi la decidojn de la internacia juĝopovo.

La proponitaj rimedoj, kiel la rompo de la rilatoj, la bojkotado, k.s., povas esti ne sufiĉaj, se la malobeanta regno estas potenca, kaj perforte prenas la kontestafjon (ekzemple, teritorion je kiu ĝi pretendas). Oni do devos alpreni pli efikan trudrimedon aŭ rezignacii je la malobeo - kio estus la nuligo de ĉiu justeco. La okazo estus simila, se regno antaŭe rifuzus submeti malkonsenton al arbitracio. Ĉu oni kontentigos sin per principa ekskomunikado kaj fakte lasos la rifuzinton trankvile akiri tion, kion ne alcedas la juĝo? Tiu solvo estus abomena, Ĉar ĝi havus la rezultaton favori ĝuste la regnon, kiu laŭplaĉe rompas sian promeson. La sankcio per internacia armeo sin trudas kiel supera garantio de la internacia juro.

La publika opinio tiuokaze tute ne sufiĉas, kaj estus naive iluzii pri tio. Povas esti, ke la arbitracia juĝo vekas malaprobos en kelkaj ŝtatoj, kaj ke la publika opinio estas dividata. La arbitraciantaro estos nature inklina al mezaj solvoj, kiuj ofte malplaĉos al la publika opinio, pli inklina al ekstremaj ideoj ne konformaj al la pozitiva juro.

Sed, oni respondos, estas neeble apliki la arbitracian procedon, se la kontraktintaj regnoj ne estas pretaj firme respekti la traktatojn kaj akcepti ĉiujn devojn, kiujn ili trudas, eĉ se el tio suferas la propra intereso. Pri tio ni principe konsentas. Tamen, tio tute ne forigas la necesecon antaŭvidi la esceptan, sed eblan, okazon, kiam fariĝos necese trudi juĝon al regno ne inklina ĝin akcepti memvole. Iu ajn nacio ja povas ekzisti kaj disvolviĝi, nur se ĝiaj anoj firme konformiĝas al la leĝoj, sed tiu alkonformiĝo ĝuste estas efiko de la sankcio, per kiu estas punataj la regnantoj, kiuj, ĉu pro propra intereso, ĉu pro alia jurkompreno, rifuzas obei la leĝon. La sankcio estas do unu el la kondiĉoj de nacia pozitiva juro. Same estu en la asocio de la nacioj.

IV *Esperanto* (UEA) N-ro 182 / 1915

Por montri la malfacilaĵojn, kiujn renkontas la apliko de la arbitracia procedo je la solvo de la politikaj konfliktoj, ni citos kelkajn ekzemplojn. Kiam oni teorie parolas pri interŝtataj malkonsentoj, oni estas inklina starigi plenan analogion inter ili kaj la interhomaj malkonsentoj en la civila vivo. En la realeco, la internaciaj konfliktoj havas alian karakteron kaj ne povas esti juĝataj per tute samaj rimedoj. Tion evidentigos la jenaj ĝeneralaj ekzemploj, kiuj rezultas el multaj faktoj de la historio.

Unua ekzemplo: Estu la ŝtatoj A. kaj B. Sur la teritorio de la ŝtato A. loĝas diversgentaj popoloj (Ni nomas gento popolgrupiĝon karakterizatan per komuneco de lingvo kaj kulturo. Ŝtato aŭ regno estas politika organismo. Ekzemple: La svisa regno konsistas el tri gentoj: germana, franca, itala). Kontraŭe, la popolo de la najbara stato B. apartenas al sama gento, kiun ni nomas b. Inter la diversaj gentoj, el kiuj konsistas la

loĝantaro de la ŝtato A., ĝuste troviĝas pli-malpli granda nombro de homoj apartenantaj al la gento b., parolantaj saman lingvon kaj dividantaj la saman kulturvicon. La ŝtato B. politike celos al tio, ke la loĝantoj b. en la ŝtato A. estu kunigataj al ĝi, tiel ke ĉiuj gentoj b. grupiĝu en la ŝtato B. Tiu politiko estas kontraŭa al la interesoj de la ŝtato A., kies tutecon ĝi minacas. Ĝi do energie kontraŭstaros al la pretendoj de la nacio B. kaj, por forigi la danĝeron, penos ĉiumaniere malfortigi la najbarŝtaton.

Tiu kontraŭeco starigas la demandon pri unugenta aŭ plurgenta ŝtato. Demando vere tre malfacile solvebla ĝi estas, ĉar la sperto mem liveras pri tio nenian montron. Ekzistas prosperaj regnoj unugentaj kaj prosperaj regnoj plurgentaj. Ĉiu vidpunkto trovos do fervorajn defendantojn. Unuj asertos, ke ŝtato konsistanta el pluraj pace kunvivantaj gentoj reprezentas pli altan civilizŝtupon. Aliaj esprimos la opinion, ke estas pli juste grupigi samgentanojn en unu sama ŝtato, kiu posedos plian homogenecon kaj elmontrus pli fortan originalecon. Tria parto petos, ke antaŭ ol decidi pri tia demando oni antaŭ ĉio konsultu la koncernan loĝantaron.

Komprenoble ni montras nur la simplajn elementojn de la problemo, kiu en la realeco estas pli komplika, ĉar oni devas ankaŭ prijuĝi la politikan situacion de la loĝantaro b. en la ŝtato A. (rajtegeco rilate al aliaj gentoj aŭ speciala traktado) kaj la ligsistemojn, al kiuj apartenas la koncernaj ŝtatoj, kun iliaj reagoj je la ĝenerala politika situacio. En la nuna stato, tuj kiam unu el la landoj A. aŭ B. sentos sin sufiĉe forta diplomatie kaj militiste, ĝi kaptos favoran okazon por rniliti kontraŭ la alia, sub preteksto, kiu neniam estas malfacile trovebla - ĉar ekzistos ĉiam juristoj, kiuj scios pruvi, ke ilia propra nacio estas prava. La forto de la armiloj do tranĉos la malkonsenton, sed eble ne solvos ĝin.

Ni supozu, ke tia konflikto estas arbitracie juĝota. La demando en ĉi tiu okazo ne temas pri formalaj rilatoj inter ŝtatoj, sed pri ilia interna konsisto. En la nuna embria stato de la internacia juro, ekzistas nenia regulo, kiu ebligas solvi tian aferon. La arbitracia decido sekve ne povos havi juran karakteron. Ĉar ĝi ne estos la apliko de fiksita kaj akceptita juro, sed nur la opinio de la juĝantoj, ĝi estos certe tre vigle kontraŭstarata kaj, kia ajn estas la senpartieco de la arbitraciantoj, mankos al ĝi ĉia aŭtoritateco. Plie, kion povus decidi tribunalo, kiu havus nenian alian regulon ol sian bonplaĉon? Ĉu ĝi decidus la daŭrigon de la *statu quo* - solvo, al kiu oni estas inklina okaze de embaraso kaj kiu cetere estas konforma al la principo de la plensuverena kaj sendependa nacio, sankta al ĉiuj pacifistoj? Ĉu ĝi favoros la pretendojn de la ŝtato B., kaj tiamaniere aprobos la tiel nomatan gentoprincipon (principo de la naciecoj), kies aplikon povos postuli aliaj samkondiĉaj ŝtatoj? Ĉu ĝi starigos regulan voĉdonadon de la loĝanto b. en la stato A.? Ĉu ĝi elektos mezan solvon, kiu malkontentigos anbaŭ partiojn kaj lasos la demandon ne solvita, ekzemple la memstareco de la loĝantaro b. en la ŝtato A.? Ĉiokaze, kia ajn estos la alprenita solvo, ĝi ĉiam estos arbitra, ĉar mankos al ĝi la antaŭe akceptita jura fundamento. La fiksado de la juro estas do la necesega kondiĉo de ĉiu vera internacia justeco.

La demando pri la sankcio ne estas malpli grava. Ĝi eĉ estas ankoraŭ pli grava: En ekstrema okazo, decido sen jura bazo povus esti trudata, se je la dispono de la juĝopovo ekzistas trudforto, sed laŭjura juĝo povus esti tute nuligata, se mankas efika sankcio. Ni allasu, ke la arbitracia tribunalo decidis voĉdonigi la koncernan loĝantaron b. Por ke tiu voĉdonado estu serioza, necesus, ke ĝi okazu ekster la partopreno de la du partioj kaj sub senpartia internacia kontrolo. Kion oni faros, se la ŝtato A. rifuzas momente cedi sian suverenan aŭtoritaton super la teritorio b. kaj kontraŭstaras al la apliko de la arbitracia decido? Se oni ne volas, ke la decidoj de la internacia juĝopovo estu mokaĵo, estas necese, ke ili laŭbezone povu esti trudataj al

la regnoj, kiuj ne konformiĝus al ili. Kaj kiel trudi ilin, se la juĝopovo ne posedas la necesajn trudrimedojn, t.e. armeo sufiĉa por devigi al oboe eĉ la plej potenca ŝtaton?

Dua ekzemplo: Estu la ŝtatoj E. kaj F. La unua, favorita de la cirkonstancoj, al militis multajn prosperkapablajn koloniojn, sed pro neelmigremo ĝia enloĝantaro establiĝas en tiuj kolonioj nur je tre malgranda proporcio. La ŝtato F. havas densan entrepreneman loĝantaron, sed neniun kolonion aŭ nur netaŭgajn. Ni supozu, ke la ŝtato E. ĝuste havas tian kolonion, kiu taŭgus por la troa loĝantaro de la ŝtato F. Tiu ĉi estos inklina pretendi je la nomita kolonio, kaj por sin pravigi ĝi povas aserti, ke tia ŝtato estas nek justa, nek konforma al la progrespostuloj de la civilizacio. Aliparte la ŝtato E. povas respondi, ke ĝi tute ne volas oferi al alia lando koloniojn, kiujn ĝi akiris per multe da sango kaj mono. Jen kaŭzo de eventuala konflikto.

En la civila vivo tia kontraŭeco ofte aperas: Ekzistas riĉuloj, kiuj per sia mono povas aranĝi utilajn entreprenojn kaj pro diversaj kaŭzoj preferas nenion fari, kaj ekzistas malriĉuloj, kiuj, se ili havas monrimedojn, estus kapablaj efektiviĝi tiajn entreprenojn, dank' al sia inteligento kaj energio. Sed tiu konflikto pace solviĝas, ne per tio, ke la malriĉulo ŝtelas la riĉulon – kiel agus la ŝtatoj en similaj kondiĉoj – sed per tio, ke, per certaj vojoj, la riĉulo metas la forton de sia kapitalo al la dispono de la malriĉulo, kiu siavice povas riĉiĝi. Rilate al la koloniaj teritorioj tia interŝanĝo bedaŭrinde ne estas kutima. La regnoj preferas konservi senutilajn koloniojn ol profite interŝanĝi kun tiuj, kiuj ilin utiligus. Tion postulas la nacia honoro.

Se tia demando estus submetata al arbitracia tribunalo, tiu ĉi verŝajne decidus, ke restu la statu quo, t.e. la konflikto tute ne estus solvata. Estas eĉ tre dube, ke tia pretendo estas arbitraciebla. Ĝi tamen kun partopreno de aliaj elementoj povas kaŭzi militon.

Rilate al tiu ekzemplo, oni eble kontraŭdiros, ke la loĝantoj de la ŝtato F. ĉiam havas la rajton enloĝiĝi en aliaj landoj aŭ aliaj kolonioj. Al tio la regno E. povas respondi, unuflanke, ke tiamaniere ĝiaj elmigrintoj, aŭ almenaŭ iliaj idoj, alinacianiĝos kaj tiel forlasos la kulturon de la hejmolando, aliflanke, ke estas nenia kaŭzo por ke ĝi ne ĝuu tian ekspansian eblecon, kiun aliaj ŝtatoj profitis ne sole el ekonomia, sed ankaŭ el kultura vidpunkto. Tiu konflikto do ne estas pure ekonomia, kiel ĝi ŝajnas; ĝi ankaŭ havas kulturan, t.e. idean kaj sentan, fundamenton.

Tria demando: Estu la ŝtatoj I. kaj K. La unua havas multnombrajn elmigrantojn, kiuj, pro ekonomiaj aŭ geografiaj kaŭzoj, enloĝiĝas en la najbara ŝtato K. Post certa tempo, alta partumo de la loĝantaro de la lando I. konsistas el devenintoj de la ŝtato K., kiuj ne havas politikajn rajtojn kaj sekve ne havas influon je la regado de la ŝtato, kie ili laboras. La ŝtato I., timante, ke tiu enmigrado iom post iom modifos la nacian karakteron kaj kreskigos la influon de la ŝtato K., alprenas diversajn restrikciojn por limigi la enmigradon kaj agadon de la fremda loĝantaro. Instigite de la ŝtato I., la "fremduloj" postulas sian parton de influo en la regado de la regno de ili loĝata, al kio la ŝtato K., plene suverena, rifuzas cedi. Simila demando antaŭ kelkaj jaroj kaŭzis longan, nun forgesitan militon.

Kion povus decidi arbitraciantaro? Pro manko de ĉia regulo en la ĝisnuna internacia juro, ĝi alprenos tute arbitran decidon, kiu, sin apogante sur nenia juro, estos ĉiam facile kontestebla. Kontraŭe, la konflikto aŭtomate solviĝos aŭ, pliĝuste, eĉ ne okazos, se la farota internacia juro fiksas tiun gravan demandon,

ekzemple antaŭvidante templimon, post kiu fremduloj enloĝantaj fremdlande ĝuos politikajn rajtojn sub rezervo de reciprokeco. En tia okazo, nenia decido estas akceptebla, se ĝi ne bazas sur jurprincipo jam antaŭe konsentita.

Kvara ekzemplo: La ŝtato O. militiste okupas kaj administras la teritorion loĝatan de la popolo P., pravigante sin per tio, ke la popolo P. estas nekapabla regi sin mem, kaj el tio rezultas malordoj, kiuj grave malutilas la interesojn de la ŝtato O. Post kelkaj jaroj, la popolo P. agitadas por forigi la entrudon de la okupinto kaj restarigi la nacian sendependecon. Al tiu agitado kontraŭstaras la ŝtato O., kiu, pretekstante la nekapablecon de la popolo P. je memregado, pretendas daŭrigi la okupadon kaj malhelpi ĉiun emancipemon.

Tiu demando unuavide ŝajnas rilati al la internaj aferoj de la ŝtato O. En la realeco ĝi tamen povas konduki al internacia konflikto, unuflanke ĉar la popolo P. neniam akceptis la plenumitan fakton, aliflanke ĉar la dependeco aŭ nedependeco de la teritorio P. eble havas gravajn konsekvencojn je la mondpolitiko. En tiu ekzemplo la konflikto ne estas inter suverenaj ŝtatoj. Tamen el ĝi povas rezulti gravega milito, - liberiga milito laŭ unuj, ribelo laŭ aliaj. Ĉu tia konflikto estos transdonata al arbitracio, aŭ ĉu, konsiderante ĝin kiel internan aferon de la lando O., oni lasos tiun ĉi lastan fini ĝin perforte? En la lasta okazo, oni devas do konkludi, ke malgraŭ la ekzisto de internacia juĝopovo sangoplenaj militoj ne estas eviteblaj. Por ke tia malkonsento estu arbitracie juĝebla, necesus unue, ke la arbitracia tribunalo povu juĝi ne sole la interŝtatajn konfliktojn, sed ankaŭ la demandojn, kiuj rilatas al la interna strukturo de la nacioj, Tio ĉi signifus, ke la principo de la suvereneco kaj absoluta sendependeco de la ŝtatoj devas suferi gravan limigon. La plendoj de la popoloj sin dirantaj subpremataj estas allaseblaj nur se ekzistas internacia juro fiksanta ne sole la rilatojn inter jam formitaj ŝtatoj (ŝtatrajtoj), sed ankaŭ la kondiĉojn, laŭ kiuj la popoloj povas grupigi konforme al siaj aspiroj, elirante el ekzistantaj ŝtatoj kaj formante novajn (popolrajtoj). Pri tiu tre grava demando ni reparolos poste. Ni nun nur konstata, ke eĉ se ekzistus juĝopovo por la interŝtataj konfliktoj, la milito ne estos forigebla dum vivas popoloj, kiuj, pretendantaj memstare ekzisti, devas rompi siajn ligilojn nur perforte, ĉar ili ne havas la povon triumfigi sian idealon pace, konforme al pozitiva juro.

Ni facile povus plimulti la ekzemplojn kaj pli longe pritrakti iliajn eblecojn. El la faktoj de la historio, ĉiu senpene starigus similajn problemojn. Ni tute ne celas substreki la neeblecon pace solvi la supre skizitajn konfliktojn. Kontraŭe, ni opinias, ke ili estos solveblaj kiam asocio de la ŝtatoj estos starigita sur la bazo de pozitiva juro kaj provizita je la necesaj politikaj organoj. Ni nur deziris montri, ke la arbitracio, kiel oni ĝin proponis ĝis nun, t.e. sen jura fundamento kaj sen trudrimedoj, estas nekapabla solvi la malkonsentojn, el kiuj devenas la modernaj militoj.

Por alpreni tiun konvinkon, necesas, ke oni konsideru la internaciajn konfliktojn laŭ iliaj veraj kaŭzoj kaj ne laŭ la grava diferenco, kiun ofte malatentas la arbitraciemuloj. Efektive, la motivoj de la casus belli ofte rilatas al faktoj, kiuj ŝajnas malgravaj en si mem. Sed oni ne eraru! Tiuj faktoj tradukas streĉostaton, kies veraj kaŭzoj estas intence lasataj en la mallumo. La teksto mem de la ultimatumo tute ne montras ilin. Tre ofte la faktoj en ĝi citataj estas trograndigataj aŭ malĝuste prezentataj, eĉ kelkfoje tute elpensataj. - Sed trans la faktoj pli-malpli trafe elektitaj, estas facile difini la verajn kaŭzojn de la malkonsento. Samaj faktoj povas fariĝi casus belli inter du ŝtatoj, kies politikaj interesoj kontraŭstaras, dum inter aliaj ŝtatoj ili estas pace solvataj meze de ĝenerala indiferenteco. Oni povas klare diferencigi la pretekstojn el la veraj kaŭzoj, kiam oni konsideras la militon en ĝia fariĝado kaj en ĝia konkludo. Apenaŭ ekparolis la armiloj, la publika opinio

malinteresiĝas je la ŝajnaj kaŭzoj kaj okupiĝas pri la veraj. Kiam la paco estas konkludita, la faktoj, cititaj en la ultimatumo, eĉ ne estas priparolataj de la pactraktato.

Nu, multaj pacifistoj prijuĝas nur la laŭvortan sencon de la ultimatumo kaj de la diplomaciaj dokumentoj, ne ilian spiriton. Se oni ekzamenas la faktojn laŭlitere, ŝajnas, ke efektive ili devas esti solveblaj arbitracie. Sed kiam tiuj faktoj estas nenio alia ol preteksto aŭ okazaĵo el la profunda konflikto, ilin transdoni al arbitracio estus tute vana, ĉar restus la fundo mem de la malkonsento. Sufiĉus iu ajn okazantaĵo, facile kreebla, por ke la tuta demando reaperu same akra. Oni povas taksii la valoron de la arbitracio nur se oni konsideras la internaciajn malakordojn en ilia vera karaktero.

El ĉio antaŭe dirita, ni do kredas, ke la jenaj konkludoj estas allaseblaj:

1^e: La arbitracio, kiel ĝi estis ĝis nun proponita kaj aplikita, estas oportuna rimedo por solvi la nepolitikajn internaciajn malkonsentojn. Sed rilate al la pacproblemo tiu rolo estas malgrava, ĉar la militojn kaŭzas politikaj malkonsentoj.

2^e: La arbitracio estus aplikebla je la solvo de la politikaj malkonsentoj nur se ekzistus: a) internacia pozitiva juro, laŭ kiu estus solveblaj ne sole la interŝtataj konfliktoj, sed ankaŭ la konfliktoj inter popoloj kaj ŝtatoj; b) sufiĉaj trudrimedoj por devigi la ŝtatojn al la obeo de la komuna juro.

Internacia leĝo kaj internacia armeo: tio signifas do, ke inter la nacioj devas kreiĝi vera politika ligilo.

En la lastaj jaroj, valora tempo estis foruzita por tute malgravaj taskoj. Oni ellaboris regularojn pri la funkciado de la arbitraciaj tribunaloj, starigis multajn je la paca vidpunkto senutilajn arbitraciajn traktatojn, tre longe diskutis pri detalajoj, sed la fundamentan, la ĉefan, la necesegan taskon oni malzorgis, nome interkonsenti pri la fundamentaj principoj de la internacia juro, sen kio eĉ la plej kompetentaj juĝistoj povas agi nur arbitre kaj ĥaose. Oni kredis, ke la starigo de nova internacia ordo - unu el la plej grandaj revolucioj de la historio - estas realigebla per mekanikaj empiriaj procedoj, sen transformo de la politikaj ideoj, kiuj estas la bazo de la nuna ŝtatsistemo.

V *Esperanto* (UEA) N-ro 183 / 1915

La apliko de la arbitracio ĉiam estis la ĉefa punkto de la pacifista celado. Sed krom tio estis formulitaj diversaj aliaj postuloj celantaj daŭre plibonigi la interŝtatajn rilatojn. Sub la influo de la lastaj okazintaĵoj, kelkaj pacifistaj grupiĝoj interkonsentis pri minimuma programo, kiun ni rajtas konsideri kiel la plej freŝan esprimon de la pacifista doktrino. Jen, ekzemple, la proponoj, pri kiuj unuanime interkonsentis la Konsilantaro de la Pac-Oficejo:

1^e Interveno de la neŭtralaj ŝtatoj en la starigo de la estonta paco.

2^e Respekte al la rajto de la popoloj libere decidi pri ilia destino. Neniu aneksado okazos sen la libera interkonsento de la loĝantaro. En la landoj kun pluraj gentoj, la rajtoj de la malplimultoj devos esti garantiataj.

3^e Organizado de internacia konstanta juĝantaro.

4^e Limigo de la armado. Eksproprigo de la militilfabrikejoj.

5^e Senkaŝa diplomatio. Nuleco de la sekretaj traktatoj kaj de ĉiuj konvencioj ne aprobitaj de la balotitaj popolrepresentantoj.

6^e Forigo kaj malpermeso de ĉiu ataka aŭ defenda kunligo.

7^e Reĝimo de la libera komerco por la kolonioj. Paŝoj al la libera komerco inter la ŝtatoj. Forigo de ĉia komerca privilegio je la profito de ŝtato aŭ ŝtatgrupo.

8^e Ĉiulanda starigo de punleĝoj kontraŭ la kalumnioj kaj insultoj direktataj per la gazetaro aŭ ĉiu alia rimedo kontraŭ la fremdaj nacioj.

9^e Kunvoko de la Pac-Konferenco, kiu antaŭ ĉio fiksusian konstantan karakteron kaj regulan kunsidadon.

La minimuma programo, kiun voĉdonis la internacia kunveno iniciatita de la Nederlanda Kontraŭmilita Ligo enhavas similajn postulojn (Ĝi plie proponas la starigon de konstante Internacia Konsilantaro de Enketo kaj Perado, la forigon de surmara ŝtelakiro kaj la certigon de libera maro.

Por ĉi tiu studo ni uzos la programon ellaboritan de la Internacia Pac-Oficejo, kiu, kiel sciante, estas la konstanta plenuma organo de la ĉiulandaj pacifistaj organizaĵoj.

La unuan deziresprimon ni flanke lasos, ĉar ĝi ne havas principan ĝeneralan karakteron, sed rilatas pli speciale la preparadon de la venonta pactraktato.

La dua propono, kontraŭe, starigas gravegan principon, kies apliko tute transformus la tradician ŝtatpolitikon kaj komencus novan epokon en la vivado de la popoloj. Ĝi ja permesus solvi ĉiujn interŝtatajn politikajn konfliktojn, kaŭzitaĵojn de reciprokaj pretendoj je teritorioj loĝataj de civilizitaj popoloj. Tiu principo apogas sin ne sole sur teoria jurkompreno, sed ankaŭ kaj precipe sur la historia sperto kaj la psikologio de la popoloj.

En la daŭro de la antaŭaj jarcentoj la aneksado de landpartoj sen la konsento de ilia enloĝantaro ŝajnis fakto normala, tute konforma al la militleĝoj, kiuj lasas la venkiton je la plena povo de la venkinto. Eĉ ofte tiaj aneksoj okazis meze de la indiferenteco de la koncernaj enloĝantoj, kiuj, senrajtaj, malkleraj, malliberaj, havantaj pure lokan patriotismon, ne multe interesiĝis pri la ŝanĝo de siaj malproksimaj estroj, se nur ili povis konservi siajn kredojn, siajn kutimojn, siajn bienojn. Nur kiam la almitinto minacis trudi aliajn vivregulojn aŭ pretendis aliigi je sia profito la dispartigon de la bienoj, la almitita popolo ekkonsciis pri sia

personeco kaj sentis ĝermi en si mem la amon al la subpremata patrujo kaj la malamon al la entrudema invadinto.

Sed en la pli lastaj jarcentoj grava transformiĝado okazis: el la feŭda ĥaoso eliris iom post iom la modernaj nacioj, kiuj fariĝis pli kaj pli firmaj kaj kompletaj organismoj. Je tiu evoluo respondas paralela evoluo de la loka patriotismo al la nacia patriotismo, kiu tra la severaj frapoj de la historio profunden enŝiksiĝis en la kolektiva animo de la popoloj. Nuntempe la aneksado de civilizitaj teritorioj kontraŭ la volo de iliaj loĝantoj vekas ĉe multaj homoj senton de indigno kaj kompatato, ĉar ili jam konscias, ke la nacieco estas ne sole jura fakto, sed precipe spirita bieno, kiun atenci estas barbare kaj absurde.

En pasinta epoko ŝajnis tute memkompreneble, perforte trudi ian religian kredon al la homoj, kiuj havis alian. Riveroj de sango fluadis ĝis oni konvinkiĝis je la psikologia neebleco perforte ŝanĝi profunde enradikigitan kredon. El tiu severa sperto rezultis relativa tolerado. La nacieco fariĝis vera kredo, kiun ne plu povas aliigi la forto de la armiloj. Oni ja ankoraŭ aneksas loĝantaron je politika kaj ekonomia vidpunkto, tio estas en ekstera maniero; la forto de la armiloj decidas novan juran staton, sed ĝi ne estas kapabla efiki je la animo de la popoloj en tia senco, ke ĝi detruu la malnovan kredon kaj anstataŭu ĝin per alia. Tio tute ne signifas, ke la naciaj sentoj estas neŝanĝeblaj. Sed tiu ŝanĝebleco dependas de diversaj psikologiaj faktoroj, ne de la perforto. Vane oni plimultigos la severajn leĝojn, vane oni penos atingi la ribelan popolon en la uzo de ĝia lingvo, vane oni elŝiros ŝiajn infanojn por detruu en ilia animo la instinktan amon al ilia vera patrujo, vane oni minacos la homojn en iliaj bienoj kaj en ilia agado - oni sukcesos subpremi, sed oni ne atingos asimilon, ĉar tiu ĉi ĉiam estas memvola kaj senkonscia. La subpremata popolo restos tia, kia ĝi estos, kurbigita sub la jugo de la pli forta, sed preta kapti ĉiun okazon por sin liberigi je la almlilito. Tiel, ĉia aneksado plenumita sen antaŭa konsento de la interesuloj, havas en si mem la ĝermon de estonta revenĝa au liberiga milito; ĝi estas la kreanto de la grandaj interpopolaj malamoj, kiuj malgraŭ la sango verŝita sur la batalkampo rapide ŝanĝiĝus en indiferentecon, se la plendoj de la subpremata popolo ne vivigus kaj preterdaŭrigus tiun malamon.

Grava demando estas, ĉu la apliko de tiu principo ne estus kontraŭa je la progresado de nia civilizacio, kiu postulas, ke regu la pli kapablaj popoloj super la tiel nomataj civilize malsuperaj gentoj. Teorie, tiu postulo ŝajne kontraŭstaras je la memranga rajto, laŭ kiu ĉiu popolo povas libere disvolviĝi laŭ sia propra genio. Sed ekzistas nenia jurprincipo, kiu ne suferas limigon. En ĉi tiu okazo, la nomita rajto estas aplikebla ĝis tia grado, ĉe kiu ĝi ne kolizias kun pli alta neceseco, nome la konservado kaj progresado de nia komuna civilizacio. Sekve, oni ne povas paroli pri ĝia absoluta apliko je la gentoj, kiuj ne estas ankoraŭ sufiĉe civilizitaj por ke ili povu per memstara ekzisto partopreni je la altaj kulturtaskoj de la homaro.

La ordo estas la necesega kondiĉo de la disvolviĝo de la civilizacio, ĉar ĝi certigas la sekurecon, kiu permesas al la homo dediĉi lian energion al kreada laboro. La rajto de la popoloj je memregado, fiksita en konformeco kun la superaj interesoj de la civilizita naciaro, estas principo de ordo; kontraŭe, la rajto de almlilito kaj arbitra aneksado eternigas la internacian anarkion, t.e. la sistemon, el kiu la milito estas nepartigebla.

Sed oni ne devas forgesi, ke tiu ĝenerala principo, kvankam ĝi havas teorie sufiĉe multajn aprobantojn, ankoraŭ tute ne estas alprenita de la ŝtatoj kaj popolgvidantoj. Ĉe ili regas ankoraŭ tia simila pensmaniero, kia regis antaŭ kelkaj jarcentoj, kiam la aneksado de teritorioj sen konsento de la veraj

interesuloj aperis kiel tute normala fakto. Verdire, kelkaj ŝtatestoj okaze subtenas kun energio tiun principon, kiam ili supozas, ke de ĝia apliko en difinitaj cirkonstancoj povus rezulti pligrandiĝo de ilia propra lando, sed akcepti ĝin kiel ĝeneralan regulon, je kiu ili devus konformiĝi en ĉiuj cirkonstancoj, ili ne volas. Tiu sintenado rezultas el la profunde enradikigita kredo, ke la aneksado de teritorioj estas rilate al la almlilitinto grava profito kaj prestiĝkresko. Ĉar sekve de la internacia anarkio, la intereso nacia estas la supera kondutregulo de ĉiu ŝtatesto, tiu lasta juĝas, ke vera krimo kontraŭ la nacio estus la fakto ne aneksi al ĝi teritoriojn, kiujn li opinias utilaj je diversaj vidpunktoj, aŭ ne perforte subpremi la sentojn de loĝantaro, kiu dezirus aparteni al alia politika organismo. La sola limigo je tiu teritoria ekspansio rezultas, ne el la respekto de la moralo aŭ de la juro (la moralo ne ekzistas en la politiko, kaj la juro internacia ne estas fiksita), sed el la ĝeneralaj politikaj kondiĉoj kaj je la kontraŭaj fortoj.

La supozataj profitoj de la aneksadoj povas esti konsiderataj je tri diversaj vidpunktoj: ekonomie, ĉar la akiro de teritorioj povas havigi al la almlilitinta ŝtato gravajn enspezojn, novajn vendokapablojn por ĝia komerco, krudan materialon de ĝi bezonatan por la industrio; politike, ĉar per tio la potenco de la venkinta nacio pligrandiĝas, kaj ĝi sekve povas atingi novajn profitojn sur la kampo de la mondpolitiko; militiste, ĉar la armeo de la almlilitinto plivastiĝas je la armeo de la almlilito kaj aliparte, ĉar el la aneksado povas rezulti pli bona strategia landlimo, dank' al kiu kreskas la sekureco de la konkerinta nacio.

Kelkaj aŭtoroj penis pruvi, ke, kontraŭe, la almlilito de fremdaj teritorioj tute ne estas profitfonto rilate al la konkerinto; ĝi estas pli vere kaŭzo de malprofito kaj malfortiĝo. Ekonomie, la konservado kaj defendado de okupita landparto postulas elspezojn ofte superajn je la pliaj enspezoj; aliparte, ĉar nuntempe la privataj posedaĵoj ne estas konfiskataj kaj la venkitoj restas liberaj uzi laŭ sia plaĉo siajn laborrimedojn, la nova teritorio estas por la almlilitinto ne sole nova vendokampo, sed ankaŭ nova konkurokampo, ĉe kiu la interesoj de la produktantoj apartenantaj al la konkerinta lando kontraŭstaras kun la samcelaj interesoj de la produktantoj el la almlilita teritorio. Politike, la aneksemo vekas la malfidon de la najbaraj ŝtatoj, kiuj por siavice eviti malgrandiĝon tendencas kunligiĝi por malhelpi plian ekspansion de la aneksinta nacio. Ofte ankaŭ la almlilita loĝantaro estas inklina ribeli aŭ almenaŭ politike agitati kontraŭ la venkinto. Fine, militiste, la konkerinto nepre bezonas potencon armeon por defendi la akiritan landon kaj kontraŭstari al la danĝero, kiu rezultas el la kunligo de la najbaraj nacioj timigitaj de ĝia ambicio.

Inter la aŭtoroj, kiuj volis pruvi, ke la aneksado havigas nenian profiton al la venkinto, oni devas citi Norman Angell, kies verko 'La Granda Iluzio', aperinta antaŭ kelkaj jaroj, ĉie vekis gravan intereson. Tiu aŭtoro konsideras, ke tiu demando estas la kerno de la pacproblemo; laŭ lia opinio, nur kiam la ĉiulandaj ŝtatestoj estos konvinkitaj pri la materia senutileco de la almlilito, ili ĉesos konduki politikon militeman.

Tamen, ni kredas, ke ne povas esti tute konvinka la demonstracio de la respektivaj profitoj kaj malprofitoj rezultantaj el la konkerado, speciale je ekonomia rilato, ĉar la elementoj, kiujn oni devas prikonsideri ĉe la ekzameno de tiu demando, estas tiel diversaj kaj multflankaj, ke estas malfacile atingi tute objektivan konkludon. Oni, ekzemple, ja povus - eĉ tio estus malfacila - starigi la kalkulon de la elspezoj, kiujn faris ŝtato por almlilita teritorio, sed estas neeble difini la enspezojn, ĉar inter la enspezantoj estas ne sole la ŝtato, sed privataj individuoj el la konkerintoj, kiuj realigas gajnojn, kies taksado estas nebla, tial ke la interesuloj certe ne favorus la rilatajn esplorojn. Do, eĉ nur je la financa vidpunkto, estas tre malfacile starigi ĝustan bilancon de konkerado. En alia rilato, oni devus zorge prikonsideri la geografiajn, ekonomiajn kaj kulturajn kondiĉojn de la aldonita lando, kiuj estas ekstreme variaj kaj ofte tre diverse takeblaj. Povas eĉ

esti, ke laŭ la okazoj ambaŭ supre resumitaj tezoj estas pravaj: el ekonomia vidpunkto, almitaĵo estas utila en kelkaj okazoj kaj malutila en aliaj. Cetere, akordigi ambaŭ tezojn ŝajne kontraŭajn estas eble, se oni difinas tion, kion oni nomas 'profito de la ŝtato'. Ŝtato konsistas el pli-malpli vasta grupiĝo de individuoj, kaj la ĝuo, kiu rezultas el la ŝtatprofito ekzistas, nur se ĝi estas dispartigata inter individuoj. Nu, estas certe, ke la profitoj de la ŝtato - se estas profitoj - tute ne estas egale dividataj inter ĉiuj ŝtatanoj. Nur certaj rondoj, kiuj pli proksime rilatas je la regado de la ŝtato, partoprenas je la gajnoj. En tiu senco, oni povas aserti, ke venka milito tute ne plialtigas la ekonomian bonstaton de la popolamaso mem, sed nur de certaj klasoj.

Sed alia pli grava vidpunkto estas konsiderinda. La ideo, ke ŝtato almitas nur por ekonomia gajno, devenas el la malĝusta ĝenerala doktrino, laŭ kiu la materiaj interesoj gvidas la homon. Ni ja scias, ke pli potencaj ol tiuj interesoj estas la ideoj kaj la sentoj. Same rilate al la ŝtatoj, kiujn kondukas homoj de la sama esenco kiel la aliaj individuoj. Multaj ŝtatoj ofte almitis teritoriojn ne por sin pliriĉiĝi - la aneksaĵoj estis kaŭzo de ekonomia malriĉiĝo - sed por aliaj celoj, kiuj ne havas materialan karakteron, ekzemple ĉu por kunigi samgentajn popolojn, ĉu por kreskigi sian politikan influon kaj militistan potencon, ĉu simple por malhelpi, ke alia ŝtato okupu la koncernan teritorion. Tiu ĉi lasta okazo estas ofta, kiam temas pri lando nekapabla sin mem regi kaj sekve fatale destinata por esti okupata de alia ŝtato. La almitado estas do pli ofte kaŭzata de prestiĝemo kaj influemo, t.e. psikologiaj faktoroj, ol de gajnemo, kvankam, kompreneble, ĉe ĉiu anekso ekonomiaj elementoj ankaŭ ne estas malzorgataj.

Ĉu oni do ne povas pruvi, ke almitoj estas malutilaj? Je la pure nacia vidpunkto, kun niaj tradiciaj ideoj, tiu pruvado ne estos facile akceptata. Sed oni neniam povos solvi la pacproblemon, se oni ĉion juĝas laŭ la nacia kriterio. Ni devas prikonsideri la demandon pri la almito tra la intereso de la homaro, aŭ, prefere de la civilizacio. Tiam facile estas pruvi la malutilon de la konkeremo. La progresado de la civilizacio postulas ordon kaj sekurecon. La almitado, kiu senĉese naskadas novajn militojn kaj daŭrigas ĝeneralan staton de malsekureco, estas grava faktoro de la internacia anarkio. Oni do devas ĝin forigi, ĉar ĝi kontraŭstaras la progresadon de la tuta homaro kaj, sekve, de ĉiuj nacioj, kiuj kune estos pli prosperaj ĉe internacia ordo ol ĉe la nuna ĥaosa reĝimo. Tiel same la socio malpermesas kaj punas la ŝtelon, ĉar, forigante ĉian sekurecon, ĝi malhelpas la homon produkti, kaj sekve malutilas al la tuta socio, t.e. al ĉiuj socianoj kune, kvankam je la individua vidpunkto, oni ne povas nei, ke la ŝtelinto havas tujan materialan profiton. Nur per ŝtata asociiĝo la homoj povis efike malpermesi la ŝteladon, ĉar ili, pro sia kuniĝo, havis rimedojn por trudi sian kolektivajn volon konforman al la ĝenerala socia intereso. Simile, nur per asocio ilin ĉiujn unuigonta, la nacioj povos forigi la almitemon. Oni do konstatas, ke la forigo de la almitoj kaj la respekto al la popolarĵo je memkzisto postulas asocion de la nacioj, t.e. interŝtatan organizon.

VI *Esperanto* (UEA) N-ro 184 / 1915

La principon de la popolarĵo je memkzisto oni devas ekzameni ne sole teorie, sed ankaŭ praktike. Multaj personoj volonte konfesas, ke ĝi estas teorie pravigebla kaj eĉ dezirinda; ili tamen dubas, ĉu ĝi estas sisteme aplikebla en ĉiuj okazoj.

Ni jam difinis, ke allasebla ĝi estas nur koncerne al civilizitaj popoloj, kiuj sen ia ajn malutilo por la interesoj de la homaro, povas esti konsiderataj kiel egalaj antaŭ la juro. La necesecon de tia limigo, en la nuna stato de nia civilizacio, neniu ja kontestos. Sed tiu principo devas esti pli komplete formulata, se oni volas havi ĝustan ideon pri ĝiaj politikaj konsekvencoj: Ekzistas pluraj landoj, kie, ĉe la sama regiono, kunvivas diversgentaj loĝantoj en tia intermikso, ke estas preskaŭ neeble ilin apartigi teritorie. Se ili estus demandataj pri sia aparteneco, ili verŝajne ne esprimus unuaniman deziron. Ekzistus plimulto kaj malplimulto; tiu ĉi lasta devus submetiĝi je la decido aŭ foriri, ĉar sama nepartigebla regiono evidente ne povas havi plurajn registarojn. Sed la principo de la popolrajto, kiu bazas sur la supera ideo de la jura egaleco de ĉiuj civilizitaj popoloj, estas malrespektata, se, el sia pliforteco ĉe la voĉdonado, la plimulto arogas al si la rajton subpremi la malplimulton, fari por ĝi esceptajn leĝojn kaj nome trudi al ĝi regulojn kontraŭajn je ĝia genta sento kaj indeco. Sekvas el tio, ke la rajtoj de la gentoj, kiuj interne de difinita teritorio reprezentas la malplimulton devas esti garantiataj kontraŭ ĉia subpremado aŭ arbitro de la plimulto. Tiu garantio povas rezulti nur el internacia pozitiva juro, kiu fiksos por ĉiuj landoj la rajtojn de la gentoj laŭ la principo de egaleco, bazo de la tuta sistemo. Laŭ tio, oni konstatas, ke la formulota internacia juro devas prikonsideri ne sole la rilatojn inter la ŝtatoj, sed ankaŭ la internajn aferojn de la ŝtato pri la dermandoj, kiuj koncernas la juran staton de la gentoj en ĝi vivantaj: nova necesa limigo je la suvereneco de la ŝtatoj, kiu estas la fundamento de la nuna regnosistemo.

La demandoj pri apliko naskas kelkajn aliajn malfacilaĵojn, ĉu principajn, ĉu praktikajn, ekzemple: Kiel konsultadi la interesatan popolon pri ĝia aparteneco? Se oni decidas ĝeneralan voĉdonadon (plebisciton), kiuj estos la voĉdonrajtaj loĝantoj? Kiel oni certigos la sincerecon kaj nepridisputeblecon de la plebiscito? Ĉu la rezulton oni fiksos por ĉiu regiono (provinco, distrikto, k.t.p.) pli-malpli arbitre difinata, aŭ pri la tuta kontestata teritorio konsiderata kiel nedividebla unuo? Kiu decidus tiun voĉdonadon kaj ĉe kiaj cirkonstancoj? Ĉiuj tiuj demandoj estas gravaj, sed nesolveblaj ili certe ne estas. Kiam estos realigita la transformo de la ideoj, el kiu rezultos la alpreno de tiu principo, troviĝos la teknikaj rimedoj por ĝin enkonduki en la uzadon. Sed ĉiuokaze la solvado de tiuj demandoj ne povas esti lasata je la iniciato de la apartaj ŝtatoj, kiuj estus ĉiam inklinaj decidi laŭ sia pure nacia intereso; ĝi devas esti la tasko de la kreota internacia leĝopovo reprezentanta la asocion de la civilizitaj nacioj. Oni do atingas la konkludon, ke politika unuiĝo inter la ŝtatoj estas la necesa kondiĉo por la praktika formuligo kaj realigo de la popolrajto je memekzisto. La gentaj demandoj ne estas solveblaj sub la nun reganta reĝimo de la internacia anarkio, kiom ajn da sango estos verŝata. Solvitaj ili estos nur kiam ĉiu popolo rajtos fiksi sian apartenecon konforme al siaj kolektivaj aspiroj kaj kiam estos malaperintaj ĉiuj arbitraĵoj rezultantaj el la kunekzisto de regantaj kaj regataj gentoj, el kio devenas la pli granda parto de niaj militoj. Duobla necesaĵo sin trudas por atingi tiun celon: starigi internacian ordonon, t.e. krei politikan unuiĝon inter la ŝtatoj (federacio), interkonsenti pri jurprincipoj tiaj, ke ĉiuj ŝtatoj estu fondataj sur la konsento de iliaj anoj, ne plu sur la perforto de la armiloj. Kiam tiuj principoj fariĝos realaĵo, anstataŭ reprezenti teorian deziresprimon, la homaro estos efektiviginta unu el la plej gravaj politikaj transformoj, kiuj iam okazis. La teritoriaj demandoj, kiuj vane disfluigis tiom da sango, estos solveblaj per leĝa procedo, kun minimuma perdo de energio. Tiam, tiuj regnestroj, tiuj ŝtatistoj, tiuj eminentuloj, kiuj ĉiam konsideris kiel plej altan taskon aneksi teritoriojn perforte, konsiderante iliajn enloĝantojn kiel senaniman komercaĵon, estos rigardataj kiel la veraj subtenantoj de la internacia anarkio kaj plej grandaj malhelpintoj de la homara progreso.

La apliko de la popolrajto je memekzisto rezultigas, ke la ŝtataj landlimoj estu ŝanĝeblaj laŭ la deziro de la interesataj landanoj. Ĝi ankaŭ ebligas la formigon de novaj nacioj sin apartigintaj al ekzistantaj regnoj.

Tiu principo kontraŭstaras je alia propono de kelkaj pacifistoj, kiuj dezirus, ke la ekzistantaj ŝtatoj reciproke garantiu al si la nevarieblecon de siaj limoj tiaj, kiaj ili estas je la subskribo de la koncerna konvencio, kaj malpermesu al si ĉian teritorian pretendon rilate al la kontraktintaj nacioj.

Ni unue rimarku, ke, tiel longe ĝis la internacia juro ne havos sankcion, tia konvencio havos nenian alian garantion, ol tiun, kiu rezultas el la respekto de la ŝtatoj je la kontraktoj. La historio montras, ke ĉiutempe tiu pure morala garantio ne sufiĉis. Ĉu pro interna revolucio, ĉu pro neantaŭvideblaj ĉirkonstancoj, ŝtato povas senti sin devigata agi malkonforme al la traktatoj de ĝi subskribitaj. Tiu ŝtato ne estos necese trompema kaj malinda. Povas esti, ke la ĉirkonstancoj estas tiaj, ke malfacile ĝi povas agi alie. Tia estus la okazo, se loĝantaro *x* interne de la ŝtato A ribelus por sin aligi al la ŝtato B, kiu alvokite de la aliĝema popolo okupus ĝian teritorion - kio estus kontraŭa je la jurprincipo de la reciproka garantio de la landlimoj. En ĉi tiu ekzemplo, la aliaj kontraktintaj ŝtatoj devus aŭ rezignacii je la malrespekto de la juro, kiu tiam perdis ĉian imponon, aŭ militiste enmiksiĝi por trudi la formalan juron, t.e., ĉe la donita ekzemplo, devigi la ŝtaton B evakui la teritorion *x*, kiu restus parto de la ŝtato A, escepte se tiu ĉi memvole rezignas ĝin. Tiu ĉi lasta solvo estus ja konforma je la konvencio pri reciproka garantio de la landlimoj, kaj, se ekzistas internacia armeo, ĝi certe povus esti perforte trudata dum certa tempo, sed tute ne eliminata estus la kaŭzo mem de la agitado, nome la apartiĝemaj aspiroj de la popolo *x* interne de la ŝtato A. La malplimulto, kies memstaremaj sentoj estus subpremataj, tamen persistus je sia vidpunkto, penante influi la publikan opinion en la aliaj landoj kaj uzi ĉiujn okazajn por elmontradi sian deziron. El tio rezultus politika streĉostato, malutila je la internacia paco, tiom pli ke la ŝtato B certe favorus tiun disiĝeman movadon. Fine, oni tamen devus solvi la malkonsenton, kaj ĉar efika solvo necese estus kontraŭ la statu quo, ĝi estus ankaŭ kontraŭ la formala juro kaj havus tute arbitran karakteron.

La formala juro nek devas, nek povas kontraŭstari je la vivo; ĝi ne haltigu tion, kio laŭnature estas moviĝema kaj ŝanĝema; ĝi nur reguligu tion, kio laŭ la vivspertoj montriĝas reguligebla. La historio instruas al ni, ke kontraŭ la firma volo de popolo je memekzisto, la statu quo, eĉ apogata de la armiloj, estas nur rimedaĉo. Ĝi ne sole ne forigas la malfacilaĵojn, sed male ilin pliakrigas kaj plivastigas, ĉar ĉia agitado pri difinita celaĵo tendencas etendiĝi je aliaj objektoj kaj sekve naski pluajn malkonsentojn. Alkateniĝi popolon je alia popolo, eĉ se tio estas konforma al la pozitiva juro, estas malutila je la juro mem, ĉar tiu ĉi aperas maljusta kaj sekve perdas la respekton al ĝi ŝuldatan, kiu estas grava elemento de ĝia potenco.

Aliparte, ŝajnas nekonforme al la vivleĝoj eternigi landlimojn, kiuj estas la rezultato de historiaj hazardoj, kiuj ne povos por ĉiam ligi la homajn generaciojn. Krom tio, ke ili ofte estas tute neraciaj, multaj landlimoj estas fiksataj en maniero plene kontraŭa je la sentoj kaj interesoj de la popoloj. Se la kreota internacia juro konstantigus tian staton, ĝi frue aŭ malfrue estus malaprobata de la publika opinio, kaj ĉar ĝi ne respondus je la komuna sento pri justeco, la vivnecesaĵoj baldaŭ trudus ĝian modifon post multaj disputoj kaj rezistoj de la ŝtatoj, kiujn la ŝanĝo malfavorus.

Al tio oni verdire povas respondi, ke la teritoriaj demandoj estos multe pli malgravaj, kiam interne de ĉiu ŝtato la diversaj gentoj havos egalajn politikajn rajtojn kaj ĝuos egalan juran traktadon. Ke tiu opinio

estas parte prava, ni tute ne neas. Sed, tamen, ŝajnas al ni, ke malgraŭ la efektiva egaleco de la gentoj interne de la regnoj, dum longa tempo restos inter la ŝtatoj sufiĉaj diferencoj, politikaj, juraj kaj kulturaj, por ke al la homoj ne estu indiferece aparteni al ĉi tiu aŭ al tiu. Krom tio, por la disvolviĝo de nia civilizacio, ŝajnas nedezirinde, ke la nacioj evoluu al unuforma tipo. Estas je la intereso de la homaro, ke ĉiu nacio konservu certan originalecon, kies manifestiĝoj fruktodone efikas je la komunaj progresoj de l' mondo, kiuj rezultas el la spertoj de ĉiuj popoloj, La kompreno de la rajtoj kaj devoj de la regnantoj, la politikaj kaj sociaj institucioj, la organizprocedoj, estas elementoj de tiu originaleco. La estonta internacia ordo ne malfortigos kaj malgravigos la naciojn; sed pli vere ĝi ebligos ilian pacan disvolviĝon je la servado de la homaro. Ĝia formulo estas harmonio, ne unuformeco. Ni kredas, ke eĉ post la forigo de la interŝtata anarkio, la rolo de la nacioj restos grandega; la popoloj konsciaj je sia unueco, pli bone kunlaboros je la pliriĉiĝo de nia civilizacio restante grupigitaj laŭ nacioj, kondiĉe ke ĉi tiuj reprezentu liberan asociiĝon de homoj kunigitaj de samaj sentoj. La ideo pri la reciproka garantio de la landlimoj, t.e. la konstanta restigo de la teritoria statu quo, ne estas akordigebla kun firma internacia ordo, ĉar tiu principo preterlasas la ĉefan kaŭzon de la militoj, nome la malrespekton de la popolrajto je memekzisto.

Alia kritiko povus esti formulata. La konsultado de la popoloj pri ilia aparteneco ja kontentigus ilin, ĉar dank' al tiu procedo ili povus senmilite realigi siajn aspirojn, sed ĝi vekus gravan malkontentecon ĉe la nacio, kiu kredus suferi domaĝon pro perdo de landparto.

Tiu kontraŭdiro ne estas allasinda. Efektive, la principo de la popolrajto devas esti fiksata per la internacia juro. Tiu lasta estas starigebla nur se la nacioj memvole akceptas ĝiajn fundamentajn principojn, kaj estas pretaj konformigi sian politikon je ili. Tiel longe ĝis ĉiuj civilizitaj nacioj ne estos konvinkitaj pri la neceseco lasi al ĉiu popolo la liberan elekton de ĝia destino, vera internacia ordo ne estos fondebla. Ni ripetas, ke ĉian transformiĝon de la interŝtataj rilatoj devas antaŭiri ŝanĝo de niaj politikaj ideoj. Estas do konjektable, ke en la supre donita hipotezo, la popolo de la ŝtato, el kiu estus elprenata teritorio post voĉdonado de ĝiaj enlandanoj, sen grava agitado rezignacius je tiu fakto. Jam nuntempe tio okazus se la demando ne estus malklarigata pro la enmiksigo de aliaj elementoj politikaj, militistaj, ekonomiaj, propraj je la reĝimo de interŝtata anarkio.

Kvankam ekzistas ofta konfuzo pri tio, oni sin gardu identigi la principon de la popolrajto je memekzisto kun la tiel nomata gentoprincipo (principo de la naciecoj). Sub la esprimo popolrajto, ni esprimas la rajton por ĉiu homgrupigo loĝanta en difinita teritorio, konsiderata kiel nedividebla, aliĝi al tia ŝtato, kia plaĉas al ĝi, aŭ mem formi propran ŝtaton, se tio ne kontraŭstarus je la interesoj de la kunigitaj nacioj. La principo de la gentoj (naciecoj) estis interpretebla dumaniere, laŭ la senco, kiun oni difinas por la vorto gento (nacieco). Jen ĝi enhavas tiun saman signifon, kiun esprimas la ideo pri popolrajto je memekzisto. Jen, ĝi signifas, ke ĉiuj homoj de la sama gento, t.e. parolantaj saman lingvon, havantaj saman kulturon kaj samajn morojn, estu kunigitaj en unu sama ŝtato. Tiu ĉi do ne rezultus necese el memvola asociiĝo de homoj, sed el certaj sociaj faktoj, inter aliaj la lingvo, kiu starigas la plej netan diferenciĝon inter la homoj. Praktike, ambaŭ interpretoj alkondukas ofte je sama rezultato, sed ne ĉiuokaze. Ekzistas ja pluraj ŝtatoj, interne de kiuj pace kunvivas diversgentaj popoloj firme aligataj je la komuna patrujo kaj ne dezirantaj aparte ekzistadi. Popoloj de diversaj lingvoj kaj kulturoj povas esti unuigataj per ligiloj alispecaj, sed egale respektindaj: la komuneco de dinastio, dank' al kies kontinua agado heterogenaj popoloj travivis saman historion, partoprenis samajn ĝojojn kaj suferojn - la komuneco de politika idealo ellaborita el la samaj vivspertoj - la intencoj de la naturo mem, kiu ŝajnas esti desegninta tiel precizajn landlimojn, ke malgraŭ la

diferencoj lingvaj, rasaj, religiaj, la popoloj ne povis vivi apartigite. Estus barbare diserigi regnojn, kies anoj deziras formi ununuran popolon. Tiaj plurgentaj ŝtatoj fariĝas kaŭzo de internacia malordo, nur se, favorante kelkajn gentojn kaj subpremante aliajn, ili fakte ĉesas esti patrujo por ĉiuj. Sed kiam, per egala traktado de ĉiuj gentoj, tiuj regnoj kunigas la simpatian kaj sindonemon de ĉiuj siaj filoj, ili bonfare influas pro sia nura ekzistado, ĉar ili pruvas la eblecon kunigi diverslingvajn kaj diverskulturajn popolojn sub komuna registaro reguliganta ilian pacan kunlaboradon. La tiel formita stato estas kvazaŭ bildo de la estonta federita homaro, kiu estus taksebla je utopio, se ĝuste tiaj ŝtatoj ne montrus ĝian eblecon.

Utile do estas, ke flanke de la unugentaj regnoj ekzistu plurgentaj regnoj. Tiu fakto estas cetere neevitebla, ĉar ĉe kelkaj eŭropaj regionoj, speciale en oriento, la diversgentaj popoloj estas tiel intermiksita grupigitaj, ke neeble estas fari teritorian dispartigon de ĉiuj akcepteblan.

Oni nun multe parolas pri la gentoprincipo, kiu jam estis la ĉefa politika priokupo dum la dua parto de la antaŭa jarcento. Reorganizo de Eŭropo sur la bazo de tiu principo estas konsiderata de multaj ŝtatestoj kiel la sola rimedo por certigi daŭran pacon. Se tio signifas, ke oni reorganizos Eŭropon demandante la popolojn, oni nur povas aprobi tian deklaron, sed oni ne forgesu, ke justa apliko de tiu principo supozigas la antaŭan realigon de unu necesa kondiĉo: organizita ŝtatligo (federacio), kun la necesaj organoj por leĝofarado, leĝoplenumado kaj juĝado. Ni gardu nin kredi, ke, sen interŝtata organizo, tia jurprincipo povas gvidi la politikon de sendependaj kaj suverenaj ŝtatoj. La historio montras, ke regnoj formitaj konforme al la principo de la naciecoj rezignas tiun saman principon kaj rifuzas ĝin apliki al aliaj popoloj, kiam iliaj supozataj interesoj tion postulas.

Interŝtata organizo sur la fundamento de la teritoria statu quo ne estas vivipova. Apliki la principon de la popolrajto estas eble, nur se ekzistas interŝtata organizo. Internacia ordo estas do sinonimo al interŝtata organizo sur la bazo de la popolrajto de memekzisto.

XVIII *Esperanto* (UEA) N-ro 198 / 1917

Flanke de la propagando, kiu celas varbi al la pacideo kiel eble plej multajn homojn, grava estas la edukado, kiu el ili faros fidplenajn agemulojn. Tro ofte okazas, ke homo supraĵe akceptas novajn ideojn, sed ne forlasas la sentojn kaj refleksojn, kiuj devenas de tute kontraj kredoj. Oni ekzemple renkontas liberpensulojn, kiuj estas ekstreme sektemaj, kaj pacifistojn, kiuj tute ne sukcesis sin liberigi je ŝovinismaj antaŭjuĝoj. En tempo de krizo, tiu interna kontraŭeco inter la novaj kaj la malnovaj ideoj eksplodas, kaj plej ofte estas la malnovaj ideoj, kiuj venkas. Estas facile tion konstati nuntempe, kiam antaŭaj pacemuloj rezonas same malsprite, se ne eĉ pli, kiel la plej fervoraj ŝovinistoj. Tio devenas el la fakto, ke la homo estas multe malpli, ol li supozas, libera akcepti novajn ideojn, pro la premado de l' pasinteco. Nur zorga kaj sistema edukado, komencita sufiĉe frue kaj neniam forlasata, povas iom post iom ŝanĝi lian pensmanieron kaj aliigi lian konduton.

La pacorganizaĵo, kreota laŭ la principoj antaŭe formulitaj, devos do ĉiumaniere labori por faciligi la adaptigon de la varbitoj je la nova idealo, pliriĉigante ilian spiriton per novaj konoj kaj vidigante al ili la

mondon sub aspekto, kiun ili ne ankoraŭ bone konas. Ĝi penu interkonatiĝi kaj precipe komprenigi la historion, la instituciojn, la morojn, la kulturon de la diversaj popoloj. Ĝi montru, ke la nacioj ne havas malsamajn celojn, kiel kredigas la anarkia aspekto de iliaj politikaj rilatoj, sed kontraŭe, ke ĉiuj partoprenas laŭ sia propra genio je la plibeligo de la homara civilizo, kies fundamento estas harmonio. Ĝi substreku ĉion, kio unuigas la popolojn, ĉion, kio estas komuna inter ili kaj pri kio oni nun apenaŭ konscias. Ĝi enradikigu tiun ankoraŭ tre malmulte atentatan ideon, ke la vere utila forto de la nacio esprimiĝas per la penso kaj laborforto de siaj anoj, ne per almlito. Per unu vorto, ĝi disĵetu lumon super ĉio, kio nun estas trapenetrata de la malklereco, de la rutinemo kaj de la antaŭjuĝoj.

Jen vasta eduka agado, kiu preterpasas la supraĵan pure juristan programon de la pacifistaj rondoj, sed ĝi estas necesega, se oni fine volas enpaŝi sur la kampon de la realigoj.

Tiu edukado ne sole estu teoria, sed ankaŭ praktika. Publikigo de broŝuroj kaj edukaj verkoj, aranĝo de kursoj kaj paroladoj ĉe la lokaj centroj, agado per la ĉiutaga ĵurnalaro ne sufiĉas, kvankam ĉio tio kompreneble neniam estas senutila. Oni ankaŭ devas laŭeble plimultigi la personajn rilatojn inter diverslandanoj, per la aranĝo de studvojaĝoj fremdlanden, per la korespondado, per organizo de internaciaj manifestadoj. Nur dank' al tio iom-post-iom naskiĝos toleremo inter la popoloj kaj estos esperebla la formiĝo de nova pensmaniero, dank' al kiu ŝtatligo estos realigebla. En tiu rilato kelkaj disaj provoj estis faritaj antaŭ la milito, sed ili estis tute nesufiĉaj kaj precipe estis aranĝitaj sendepende unu de la alia, sisteme kaj sen certa rilato kun la idealo de interpopola unuiĝo.

Kiam la paca movado ekiros sur tiuj novaj vojoj, ĝi nepre sentos la necesegecon de internacia lingvo, dank' al kiu la pacamikoj ĉesos esti fremduloj unu rilate al la alia. Vane estas paroli pri la alproksimiĝo de la popoloj kaj la formiĝo de internacia spirito, se la homoj de diversaj nacioj, krom malmultaj privilegiuloj, ne estas kapablaj sin reciproke kompreni. La indiferenteco de la paca movado rilate al la celado por internacia lingvo ankaŭ devenas el la erara ideo, ke la starigo de ŝtatligo dependas pli de la bonvolo de l' juristoj kaj politikistoj, ol de la pensmaniero de la popoloj mem.

La realigo de tiu grandioza tasko estas ebla nur se ĉiulande troviĝos je la taŭga tempo, elito preta por ĝin entrepreni. Ĉu jam ekzistas la elementoj de tia elito kaj, en jesa okazo, ĉu ilia baldaŭa kunlaborado estas esperebla? - AI tio kompreneble povas respondi nur la faktoj. Sed ŝajnas nedubehle, ke jam nun en ĉiuj landoj homoj ekzistas, kiuj povas kompreni la, cetero tre simplajn, ideojn ĉi tie priskribitajn, kaj estas pretaj labori por ilia triumfo, tuj kiam formiĝos serioza organizaĵo, kiu scios tuŝi ilian spiriton kaj utiligi ilian bonvolon. La unua kondiĉo por ilia kunlaborado kuŝas en tio, ke ili komprenu, ke je la nuntempaj abomenaĵoj estas kulpa super ĉio la anarkia reĝimo, je kies konservado kaj glorigo ĉiuj popoloj partoprenis. Tiel longe kiel oni obstinos diskutadi pri la respektiva respondeco de la individuoj aŭ de la popoloj, nenia pozitiva rezultato estos atingebla. La homoj, kiuj sin dediĉos al la agado por la starigo de nova ordo internacia, devas fari strekon sub la pasintaĵoj kaj komenci sur nova fundamento.

Kiel ni jam atentigis, en la estonta agado oni turnu sin ne sole al la kleruloj aŭ al la reprezentantoj de la altaj sociaj rangoj, sed al ĉiuj klasoj. La apogo de la laboristaro, ĉe kiu troviĝas multaj freŝaj energioj por la estonta agitado, ne estas malpli necesa o la helpo de la pli altaj popoltavoloj. Precipe varbinda estas la junularo, pri kiu multaj simptomoj montras, ke ĝi estas inklina reagi kontraŭ la naciaj pasioj, al kiuj la maturaĝuloj nun egantaj la popolojn oferas kun trankvila animo la prosperecon de Eŭropo kaj la bonstaton de

milionoj da homj. Signoj ekanoncas, ke, se oni permesas al ĝi vivi, la nova generacio ne tiel obeeme akceptos la ideojn, en kies nomo oni serene mortigas la pli belan parton de la homaro. El ĝi povu stariĝi la pioniroj, kiuj kun freŝa energio kaj forta koro sin dediĉos al la starigo de la fundamento, super kiu la homoj morgaŭ interkonsente laboros je la interpopola unuiĝo!

AI la personoj, kiujn interesas nur la estantaĵoj kaj proksimaj realaĵoj, tiu ĉi studo kredeble ŝajnos plene superflua. Ili ja opinias, ke pli ol iam ni staras malproksimege de tiu epoko, kiam ĉiuj nacioj pace kunvivis, kaj ili jugas tute vana ĉian penadon por ekkrei novan pensmanieron, ĉar ili kredas, ke la nuna militego kun ĉiuj malamoj de ĝi naskitaj por tre longa tempo nebligis realproksimiĝon inter la militantoj. Tia pesimista opinio ja ne estas tute senfunda, sed oni ankaŭ devas prikonsideri la alian flankon, kiu estas multe pli esperiga. Kontraŭ la ideo mem de la milito, la nuntempa batalado pli efike propagandis, ol la plej bonaj teoriaj asertoj de la paca epoko, kaj plie ĝi en blindiga maniero atentigis ĉiujn pri la gravegeco de la problemo pri internacia ordo. Antaŭ la nunaj okazantaĵoj la granda plimulto de la homoj ja estis kontraŭ la milito, sed, ĉar ili ne kredis je ĝia eventualeco, malgraŭ ĉiuj signoj, ili malinteresiĝis je la demando kaj dediĉis sian atenton al multe pli gravaj aferoj. Tio estas nun ŝanĝita. La sangoplena sperto instruas la tutan homaron pri la plej urĝa necesajo de nia tempo. La antaŭa sistemo de la konservado de l' paco per ekvilibro kaj kiel eble plej granda armado mizere bankrotis. Tion eksentas eĉ la registaroj, sed ili vere laboros je la starigo de la ŝtatligo, kies principon ili deklaras akcepti, nur kiam ilin puŝos, stimulos, alpremos forta kaj celkonscia publika opinio. Ĉar la granda plimulto de la homoj en diversaj gradoj suferis de la milito, estas konjekteble, ke ilia indiferenteco estos de nun malpli granda ol antaŭe.

Por ili ekzistas nur unu senrefuta instruilo, nome la sperto. Pli ĝenerala kaj pli terura sperto ne povus esti. Estas apenaŭ kredeble, ke ĉion tion oni forgesos kaj morgaŭ agos same kiel hieraŭ. Krom tio, la milito estas fosanta sian propran tombon. Ĝi atingis la limon de l' absurdo. De pli ol tridek monatoj, milionhomaj armeoj interbataladas senrezultate, kaj ŝajnas, ke se oni konsideras la dujaran sperton pri la moderna sciencega milito, solvo per la armiloj estas apenaŭ antaŭvidebla. Ĉiuokaze la eksterordinaraj oferoj kaj perdoj, kiujn kaŭzas la nunaj buĉadoj, estas absolute senproportiaj je la kelkaj teritoriaj ŝanĝiĝoj, kiuj eble plenumiĝos. La milito estas ne sole naŭziga, kiel atestas la partoprenintoj, sed ankaŭ absurda, eĉ je la vidpunkto de siaj ĝisnunaj defendintoj. Tion ekvidas ĉiuj saĝaj homoj, malgraŭ la ornamoj de la gazetaro kaj de mensoga literaturo. Ĉu estas utopie pensi, ke tiuj diversspecaj sentoj sukcesus forpuŝi la malamon kaj malfidon, kiuj estas la fruktaĉoj de la batalado?

La milito, ni ne ĉesu tion rediri, ne estas superhoma fatalaĵo. Ĝin povas malhelpi la homa volo, transformante la sistemon, de kiu ĝi devenas. La ideoj, sur kiuj sin apogas tiu sistemo, ne estas eternaj; same kiel aliaj, ili povos ŝanĝiĝi, se nur stariĝas energia elito en ĉiuj landoj, kun la necedema intenco ŝirmi de nun la homaron kontraŭ la militmonstro. For la pasinto! i rigardu antaŭen! Ni unuiĝu kaj agu! La mondo soifas novan idealon. *(Fino)*

Antologio XIV

Auguste Forel

Kuracisto, psikiatro, formikologo, humanisto

Der Weg zur Kultur (1924)

Enkonduko:

Kiel oni povis legi antaŭe en ĉi tiu Antologio (parto VIII), la 27an de februaro 1910 en Berno (Svislando) Auguste Forel (1848-1931) prezentis ĉe la 'Internacia Ordeno por Etiko kaj Kulturo' (IOEK) la esencon de sia filozofio maturiĝinta ĝis tiu epoko. En tiu parolado li tuŝis ankaŭ la demandon de la neŭtrala universala lingvo.

En 1924 aperis la ideologia ĉefverko de Auguste Forel sub la titolo *Der Weg zur Kultur* ('La vojo al la kulturo'). En ĉi tiu verko Forel resumis ĉiujn siajn pensojn pri plej diversaj moralaj temoj kaj postuloj, kiuj devus formi laŭ li la trajtojn de altnivela civilizo. Inter ili troviĝas ankaŭ la demando de la neŭtrala universala lingvo. Forel bone konsciis pri la konsternitaj reagoj, kiujn tia lingvo provokis ĉe filologoj. Kaj li opiniis, ke temas nur pri antaŭjuĝoj. Kompare kun lia prelego de 1910 ĉi-foje Forel atribuis pli da atento al aspektoj lingvistikaj-filologiaj. Ankoraŭfoje li prezentis la kritikon pri ĉiuj internacilingvaj sistemoj, kiujn li konis, por praviĝi, ke Eo estas la plej taŭga solvo el ĉiuj. Ĝin li prijuĝis supera al ĉiuj aliaj planlingvaj projektoj. Samtempe li bedaŭris, ke Eo forlasis la puran latinan alfabeton, kaj tial li sugestis kelkajn modifojn, ekzemple la enkondukon de la sonantoj ts, x k.a. en la alfabeto.

Sekvas la koncerna ĉapitro pri la neŭtrala universala lingvo el la libro *Der Weg zur Kultur* ('La vojo al la kulturo'), kiu estas je la dispono en la germana lingvo.

Originala teksto (en la germana lingvo):

IX. Die internationale Sprache

Wenn wir den Weltfrieden und einen Bund der Kulturstaaten erzielen wollen, ist ein gegenseitiges sprachliches Verständnis der Völker von grosser Bedeutung. Die Verschiedenheit der Sprache entzweit die Menschen mehr als Rassen- und sogar als Religionsunterschiede. Das allmähliche Verschwinden des Analphabetentums wandelt mehr und mehr frühere Dialekte in Schriftsprachen mit eigener Literatur um, wie das Lettische, das Vlämische, das Serbische, das Bulgarische, das Armenische, das Slowakische, das (übrigens neu gereinigte) Neugriechische usw., ohne von den sino-japanischen Sprachen zu reden. Kein Mensch kann heute *alle* Sprachen kennen. In umgekehrter Richtung wirkt aber der wachsende Verkehr der Völker unter einander und macht den heutigen Babelturm immer unterträglicher.

Das Problem einer internationalen Verständigungssprache ist nicht mehr neu; letztere wird immer notwendiger. Man hat das Englische als solche empfohlen; weniger als je werden aber – nach diesem Kriege – andere Nationen ihr eigenes Denken von der Sprache einer einzelnen beherrschen lassen. Ausserdem ist das Englische unter allen Sprachen am wenigsten phonetisch, von seinen andern Fehler zu schweigen. Sämtliche heute lebenden Sprachen leiden an zahllosen unnötigen Inkonsequenzen und Schwierigkeiten. Aus diesem Grunde hat man eine ‘künstliche Sprache’ geschaffen. Dieser Ausdruck entfesselte nun freilich die Entrüstung der Philologen und die Wut des Vorurteils. Letzteres erklärte die Sache für ‘unmöglich’. Der Rassen- und National-Genius wurden entgegengehalten, die Sprache müsse sich ‘natürlich’ entwickeln. In Wirklichkeit ist aber nichts so künstlich als der Zufall, der die Sprachausdrücke und ihren Gebrauch schafft. Häufig bildet der Witz eines Menschen der Ursprung eines Ausdruckes, der dann durch den Usus sprachlich festgestellt wird. Die Sonne ist im Deutschen weiblich und im Französischen männlich, der Mond umgekehrt. Warum? Übrigens handelt es sich keineswegs darum, die heutigen Sprachen zu ersetzen, sondern um etwas anderes: eine leichte internationale Verständigungsmöglichkeit zu schaffen.

Der Anfang wurde von Schleyer gemacht, mit dem in seinen Worten so unverständlichen, in seiner Struktur so schwierigen, unschönen Volapük, das dann mit Recht verschwand. Zamenhofs Esperanto konnte sich dagegen erhalten, weil es auf den überall gebräuchlichsten lateinischen und griechischen Wurzeln fusst und eine äusserst einfache phonetische, grammatikalische und syntaktische Struktur besitzt. Andere, ebenfalls rationelle Versuche, wie J. Lotts ‘Mondolingué’ und andere drangen nicht durch. Selbst die Engländer, wenn sie Esperanto sprechen, werden von jedem leicht verstanden. Jene harmonisch klingende Sprache wird heute von vielen leicht gesprochen, die sich damit gut verständigen. Sie hat also das Vorurteil bereits besiegt. Ich kann es aus eigenem Urteil bezeugen, da ich selbst den Esperantistenkongress in Genf [1906] mitmachte. Als Reformier des Esperanto[s] liess leider der Benjamin der Weltsprache, das Ido, dessen grössten Fehler zum Teil bestehen, nämlich das Alphabet. Die Konkurrenz und die Eifersucht jener beiden Sprachen ist umsomehr zu bedauern, da eine Verschmelzung bei etwas gutem Willen leicht wäre.

Nach meinem unmassgeblichen Urteil liegt der Hauptfehler des Esperanto[s] und auch des Ido[s] darin, dass beide das lateinische Alphabet geändert haben, das sehr leicht tale quale zu erhalten gewesen wäre. Das lateinische Alphabet wird überall in den mathematischen und in den Naturwissenschaften, in der Chemie, in der Chiffrierkunst usw. gebraucht. Es ist ein unverzeihlicher Fehler, dasselbe ohne zwingenden Grund irgendwie zu verstümmeln. Es genügt, die Bedeutung von vier oder fünf lateinischen Buchstaben, die je nach den Sprachen heute für den gleichen Klang doppelt gebraucht werden, zu ändern und an den folgenden Grundsatz fest zu halten: 1. ein einziger Buchstabe für jeden Einzelklang; 2. keine eigenen Buchstaben für Doppelklänge. Das Esperanto hat 7 unnötige oder leicht zu ersetzende Buchstaben:

1. c = ts
2. ĉ = tsch
3. ĝ = dj (französisch)
4. ŝ = sch (durch einen einfachen Buchstaben zu ersetzen)
5. ŭ = ganz unnötig
6. ĵ = g (wie im französischen ‘gens’)
7. ĥ = ch (wie im deutschen ‘ach’)

Das Ido hat vier unnötige oder ersetzbare Buchstaben oder Klänge

1. c = ts (wie Tsar)
2. ch = tsch (wie in 'Tschechisch')
3. j = dj (französisch)
4. sh = sch (deutsch)

Esperanto wie Ido hatten Unrecht, das ü (französisch u) wegzulassen. Man braucht sechs Vokale: a, e, i, o, u, und ü. Die Esperantobuchstaben mit Doppelklang: c, ĉ und ĝ können einfach in ihrer natürlichen Zusammensetzung als ts, tc (siehe weiter unten) und dj bezeichnet werden. Hier ist eine Bemerkung nötig. Im Deutschen entsprechen die Buchstaben p, t, k, f, s (wie im Wort 'so') und der Klang sch (wie in 'schön') genau den anderen Buchstaben b, d, g, w, s (wie im Wort 'weise') und g (wie im französischen 'léger'), mit dem Unterschied, dass die sechs ersten Konsonanten mit Lippen, Zunge und Kehle ohne die geringste Mitwirkung des Kehlkopfes ausgesprochen werden, während bei Aussprache der sechs letzteren die Stimmbänder einen verhaltenen Ton anschlagen, bevor der Konsonant losgelassen wird. Dadurch erscheint letzterer milder. Aber es genügt, etwas zu überlegen und selbst die Aussprache zu versuchen, um sich zu überzeugen, dass allein der im Kehlkopf tönende Laut, der zugleich in der Kehle verhalten wird und nur teilweise durch die Nase ausfließt, den Unterschied zwischen p und b, t und d, f und w usw. ausmacht.

Indem man den Buchstaben c (als unnötigen Doppelgänger des Doppelklangs ts oder des k) für den einfachen Konsonanten sch (wie in 'schön') und einige andere unnötige Buchstaben für andere Klänge benützt; indem man ferner die Doppelkonsonanten (wie Esperanto ĉ) in ihre natürlichen Bestandteil spaltete, kann man, wie folgt, das Esperanto behalten, wie es ist, ohne irgend etwas dem lateinischen Alphabet zuzusetzen oder etwas davon wegzunehmen.

- a = a deutsch
- b = b dt.
- c = sch dt. (wie in 'schön')
- d = d dt.
- e = e dt.
- f = f dt.
- g = g dt. (hart)
- h = h dt. (wie in 'hell')
- i = i dt.
- j = j (wie im französischen 'jeu')
- k = k dt.
- l = l dt.
- m = m dt.
- n = n dt.
- o = o dt.
- p = p dt. (wie in 'jetzt')
- q = j dt. (wie in 'jetzt')
- r = r dt.
- s = s dt. (in 'so' oder ss in 'dass')

t = t dt.
 u = u dt.
 v = w dt. (französisch 'v')
 w = ? (Man könnte es für das englische 'th' oder für das deutsche 'ö' gebrauchen)
 x = ch dt. (in 'ach', das deutsche 'x' = ks ist unnötig)
 y = ü dt. und 'y' altgriechisch
 z = z (im französischen wie in 'zèle', das deutsche 'z' = ts)

Es würde genügen, wenn irgend eine Regierung sich dazu entschliessen könnte, mit Hilfe eines zu ernennenden internationalen Komitees das Esperanto als obligatorischen Lehrgegenstand in die Schulen einzuführen, aber dabei das unveränderte lateinische Alphabet zu fordern, um bald von andern gefolgt zu werden. Auf solche Weise wäre die nächste Schwierigkeit leicht überwunden und ein grosser Schritt für die internationale Verständigung getan. Selbstverständlich müsste für die internationale Sprache eine besondere Akademie gebildet werden, deren Aufgabe es wäre, jene Sprache zu ergänzen, zu vereinheitlichen und immerfort zu verbessern. Diejenige Regierung, die in dieser Sache die Initiative ergreifen würde, täte für das Wohl der Menschheit ein bedeutendes Werk.

Anhang zu Kapitel IX.

Der Weltkrieg hat durch den Völkerbund die Frage der internationalen Hilfssprache reifen lassen. Die 'Société des Nations' hat sich bereits mit dem Esperanto befasst; in Genf, in der Tschechoslowakei usw. wird es bereits in den Schulen gelehrt. Hoffnung liegt somit vor uns.

Unter dem Namen 'Esperantido' hat Dr. René de Saussure in Bern Esperanto mit Ido kombiniert und meinen obigen Alphabetforderungen (leider nur teilweise) zu entsprechen versucht. Näheres darüber ist in der 'Internacia Scienca Revuo' (Teo Jung, Horrem bei Köln, Deutschland) und in 'Internacia Lingvo Esperantida' (Emma Chenevard, 8 Marienstrasse, Bern, Schweiz) zu erfahren. Dr. de Saussure hat vorläufig seine Reformvorschläge sistiert, um dem einheitlichen Sieg des Esperanto nichts in den Weg zu legen.